

ISSN 0032-4361

8


1992

5-19034/1992

中國報道

EL POPOLA

CINIO





Festivalo en suda Ĉinio

Foto de LING YOUJUAN





Vilaĝo en neĝa montaro

Foto de WU XINHUA

INTER NI

Kritiko utilas al plibonigo de nia laboro

Legante la numeron 1/92, p. 12/13, mi konstatis, por la unua fojo, tiom da misoj: ĉirkaŭ 30! Kial? Kio okazis? Vi neniam permesas tion. Kio do okazis ĉi tiun fojon?

JAYME PEREIRAN
(Brazilo)

Pro la eraroj en tiu numero ni jam faris memkritikon, kaj nun ni refoje petas pardonon de niaj legantoj.

La Red.

Mi reliefigas la tro disvastigadon de urbo Qingdao, kiu aperas en preskaŭ ĉiuj numeroj de EPC. Estas nekredeble! Sed estas vero!

DANIEL PELIZ
(Brazilo)

Ĉi-monate la Kvina Pacifika Kongreso de Esperanto okazos en Qingdao. Por ke niaj legantoj kaj kongre-

sanoj bone konu la urbon, ni iom multe raportis pri ĝi.

La Red.

Via indekso "malindeksigas" min ofte; mi preferas ĝin kun helpo de tipoj kaj koloroj.

ENRIQUETA SESMERO
(Hispanio)

Ni, Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj redakcio de "La Movado" (kaj ankaŭ mi persone) ricevis de vi kaj de Internacia Libro-komerca Kompanio de Ĉinio kalendaron por la jaro 1992, kaj vin dankas por via komplezo. Kaj tamen la donacojo mem ne kaŭzis al ni grandan dankemon kaj elvokis al mi cinikan penson, ĉu ne estus pli saĝe sendi nenian novjaran donacon ol tiaĵon.

SAKAMOTO SYOZI
(Japanio)

Ni akceptas la kritikon. Ni jam informis la Internacian Libro-komercan Kompanion de Ĉinio, ke ĝi ne plu donacu al niaj legantoj neesperantaĵon.

La Red.

Mi jam legis viajn elstarajn artikolojn pri la reformado de Ĉinio. Ekzemple en la Nr. 6/89 pri forstomado en via lando, aŭ en Nr. 7/89 pri akvomastromado, aŭ en Nr. 1/89 pri reformado de la prezoj. Tiaj kaj aliaj artikoloj estas skribitaj en Esperanto facile legebla kaj antaŭ ĉio — ili spiras kritikan spiriton; ili montras, ke ĉio, en kio troviĝas lumo estas ankaŭ ombro, kaj la leganto povis konkludi kaj lerni. Mi diras "povis" anstataŭ "povas", ĉar bedaŭrinde tiajn artikolojn mi ne plu trovas en via gazeto.

G. MARTIN (Germanio)

Mi tute ne komprenas, kial en via gazeto mankas paĝo de humuro kun anekdotoj, karikaturoj, felietonoj. Eĉ ni, civitanoj de la iam granda kaj nun malfeliĉa ŝtato, de tempo al tempo ridas, kvankam niaj cirkonstancoj tute ne instigas nin al tio.

S. KASIMOVCEV (Rusio)

ENHAVO

21 La unua nuklea elektrejo de Ĉinio

6 **Songô sub ginkoj**

48 *HISTORIA MISTERO:*

Kion signifas geometriaj figuroj sur koloraj fajencaĵoj?

38 Boke-o en disvolviĝo

30 Kanto kaj danco de nordorienta Ĉinio

26 *EL ĈINAJ GAZETOJ*

40 Mi ŝatas la profesion de ĉiĉerono

18 En la halo de kalisteno

44 *LOGDOMOJ KAJ MOROJ:*

Luzhi — akvolando sude de Yangzi

9 **Ŝipkonkurso en Qintong**

27 *SUR STRATOJ:*

Sub semaforo

12 Vizito al Ningbo

36 Vojaĝo al Gyaze

51 *LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO (IX):*

En la naskiĝloko de Congkapa

14 Antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio

50 *AMUZOJ*

34 *KURANTAJ AFEROJ*

8 Rakonto pri filatelaĵoj

42 Prof. Gaston Waringhien restos ĉiam ĉe ni

42 Kiel majstro longe li nin gvidos (Poemo)

20 *SUR NIA LIBROBRETO:*

El la latina, entuziasmige

16 *POR KOMENCANTOJ:*

Reciprokutila kontribuado

17 *ESP-NOVAĴOJ*

4 *INTER NI*

43 Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?

16 *KORESPONDI DEZIRAS SUR LA KOVRILO:*

Pandidoj kun bredisto Foto de **LIU SIGONG**

2 Festivalo en suda Ĉinio

4 Vilaĝo en neĝa montaro


SUR LA DORSKOVRILO: [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]:

Surroka bildo

Hispana palaco de la 17-a jarcento

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Qinshan (p. 21)
2. Longkou (p. 6)
3. Shenyang (p. 30)
4. Luzhi (p. 44)
5. Qintong (p. 9)
6. Ningbo (p. 12)
7. Gyaze (p. 36)



Sonĝo sub ginkoj

DAYUANCUN estas malgranda vilaĝo en granda montaro de Longkou-regiono, Shandong-provinco, Ĉinio.

Laŭdire, antaŭ 400 jaroj estis mezaĝa viro. Li plurfoje partoprenis en la ŝtata ekzameno en Pekino por esti ŝtatofuncisto, sed li neniam sukcesis. Kun granda bedaŭro li, malsana, forlasis Pekinon kaj volis serĉi senhoman lokon por fiksloĝiĝi, hazardo kondukis lin en la vilaĝon Dayuancun.

La vilaĝanoj akceptis lin kaj invitis lin kiel instruiston de infanoj. Sed, ekster ilia atendo, tiu intelektulo ĵuris ne plu tuŝi libron pro forta ekscitiĝo. Li plantis antaŭ sia domo du ginkojn, kiuj donis abundajn fruktojn jam en la sekvanta jaro. La intelektulo tutajn tagojn drinkis kaj dormis sub la ginkoj. La vilaĝanoj povis fari nenion kun li. Iun tagon, li vekigis kaj en ekstazo diradis al ĉiu renkontita: "En la sonĝo mi sukcesis trapasi la ekzamenon! Mi sukcesis!" En la sekvanta tago li malaperis, lasinte nenion spuron.

La intelektulo foriris kunportante sian sonĝon kaj la vilaĝo restis senlime trista. "Kiam aperos intelektulo en nia montvilaĝo?" Jen aspiro de la tuta vilaĝo.

Forpasis 400 jaroj, kaj la du ginkoj plene elkreskis kiel altaj, fruktodonaj arboj, sed la vilaĝo restis sen intelektulo. Nur post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la infanoj de la vilaĝo ekhavis ŝancon viziti lernejon. Sed en la daŭro de 30 jaroj, nur ĉirkaŭ dek el la infanoj finis sian mezlernejan studon, neniu vizitis altan lernejon, kaj la granda parto de la vilaĝanoj kapablis apenaŭ legi arabajn ciferojn kaj skribi sian nomon.

Iu mezaĝulo kun sulketoj sur la vizaĝo kaj ĝibeta dorso ofte sidadis sub la ginkoj en meditado.

Li estas Li Kehui, estro de la vilaĝo. Ekde la jaro 1978, sub lia gvido, la vilaĝanoj plantis fruktarbojn kaj funkciigis orminejon, dank' al kio ilia enspezo kreskis jaron post jaro. Tamen li ĉiam sentis, ke ankoraŭ io mankas.

En 1978, la vilaĝo decidis funkciigi industriaran entreprenon. Kunportante 8 000 juanojn, la vilaĝestro veturis al urbo por aĉeti maŝinon. Donante la maŝinon oni garantiis, ke ĝi estas novtipa kaj kvalite fidinda produkto. Sed, transportite en la vilaĝon, la maŝino tute ne funkciis. La ekspertizo de spertuloj montris, ke ĝi estas malnova ilmaŝino de la 40-aj jaroj. La vilaĝestro konsterniĝis, kaj la vilaĝanoj

vespiris.


La okazaĵo ankoraŭfoje komprenigis, ke oni ne povas ne havi sciojn. La estro venigis la vilaĝanojn antaŭ la malnovan ilmaŝinon kaj refoje rakontis pri la legendo "Sonĝo sub ginkoj". Li diris: "Pasis jam 30 jaroj de post la fondiĝo de la nova Ĉinio, tamen nia vilaĝo elkulturis eĉ nenium intelektulon. Kiu kulpas? Ni, vilaĝaj estraranoj. Pasintece nur por ĉaso de honoro ni esperis aperon de intelektulo en nia vilaĝo, sed hodiaŭ ni komprenas, ke sen scienco kaj kulturo ne eblas modernigi la kamparon kaj ŝanĝi la fizionomion de nia vilaĝo... Ekde hodiaŭ ni faru edukadon per niaj propraj fortoj. La 40- kaj 50-jaruloj devas sin liberigi el analfabeteco kaj esti iel klerigitaj, sed plej grave estas, ke antaŭ ĉio ni devas lernigi la infanojn, ĉar ili portas la esperon de nia vilaĝo." Ekboldis la kunvenejo. La ĉeestantoj unuanime aprobis lian bonan ideon. Post interkonsiliĝo kun la vilaĝanoj la estro difinis kvar regulojn pri la eduka afero de la vilaĝo: unue, la vilaĝo pagas ĉiujn necesajn elspezojn por la lernantoj de elementa lernejo kaj malsupera mezlernejo; due, la vilaĝo ĉiujare donas 200 juanojn al lernanto de teknika mezlernejo kaj 300 juanojn al lernanto de kolegio; trie, la vilaĝo donas premion de 1 000 juanoj al la instruisto, kiu sukcesas elkulturi unu elstaran mezlernejanon; kvare, la vilaĝanoj rajtas eksigi la estraranojn, kiuj ne zorgas pri la eduka afero.

En la vilaĝo la loĝantoj estas ne multaj, sed multaj estis statuoj de dioj de monto, pordo, kuirejo, tero... La vilaĝanoj kutimis incensi al la dioj okaze de la jarŝanĝo kaj festoj.

Post kiam la vilaĝo komencis disvolvi la edukan aferon, oni forigis ĉiujn diajn statuojn. Nun ili kultas "novan dion", t.e. instruiston. Iuj pendigis grandan foton de instruistoj sur la fronta muro de sia hejmo. Oni metas sian esperon sur la instruistojn.

Iutage instruisto Chen Wenliang venis biciklante al la vilaĝo. Dum pli ol 30 jaroj li rondiris de vilaĝo al vilaĝo por helpi lernantojn, transgrimpante montojn. Rigardante instruiston Chen spiregantatan kaj ŝvitegantatan, la vilaĝestro estis kortuŝita. Li sendis aĉeti motorciklon en la gubernia urbo kaj persone donis ĝin al instruisto Chen.

Transpreninte la motorciklon, instruisto Chen emociiĝis, ke liaj okuloj vualiĝis de larmoj. Li diris: "Se en la vilaĝo Dayuancun ne estos elkulturita studento, mi ne mortos en paco."



La infanĝardeno de la vilaĝo Dayuancun

Dank' al la sindonema laboro de la instruistoj, la klaso de la vilaĝo Dayuancun unuafoje gajnis la unuan lokon en la fina semestra ekzameno de la tuta distrikto.

Nelonge poste la distrikto decidis starigi gravan elementan lernejon el la elementlernejaj klasoj disaj en 7 vilaĝoj. Informiĝinte pri tio, Li Kehui brulis de malpacienca kaj tuj rapidis al la distrikta registaro. Li petegis: "Konstruu la lernejon en nia vilaĝo! Nia vilaĝo kovros ĉiujn kostojn kaj garantias konstrui unuaklasan lernejon."

Li sukcesis en la petado. La konstruado de la lernejo bezonas 110 000 juanojn. De kie havigi la monon? Li Kehui kunvokis ĉiujn vilaĝanojn sub la ginkojn kaj ripetis al ili la songon sub ginkoj. Li diris: "Ju pli ni montanoj malriĉas, des pli ni ne lernas. Ju pli ni ne lernas, des pli ni malriĉas. Sen klerigado, ni neniam povas elradikigi la malriĉecon..." Apenaŭ li finis la parolon, oni komprenis lin kaj prezentis ideojn unu post alia.


Iuj proponis: "Plej gravas konstrui la lernejon, kaj ĉiu familio ricevu malpli da mono el la ĉi-jara profito."

Aliaj diris: "Ni laboru volontule kaj per la ŝparita mono ni aĉetu konstruajn materialojn."

Dirite, farite. Ili senprokraste pretigis areon de tri hektaroj ĉe la du maljunaj ginkoj por konstrui la lernejon. En la unua tago de la konstruado, pluraj maljunuloj de la vilaĝo ordonis al siaj filoj aŭ nepoj elporti lignon, kiun ili pretigis por fari ĉerkon, por ĝin oferi al la konstruado de la lernejo. Tiuj ĉi 70-80-jaraj maljunuloj ne konas eĉ unu ideogramon, nek scias argumenti. Ili diris nur: "Se nur nia vilaĝo elkulturos intelektulojn, ni mortos en trankvilo, malgraŭ niaj restaĵoj estos entombigitaj, envolvite per mato."

Kompletiĝis la lernejo el 15 grandaj ĉambroj kun tegolita tegmento. En la klasĉambroj blankas la muroj, brilas la tabloj kaj seĝoj, kaj ekstere sterniĝas ebena sportejo, buntas flor-bedoj. Aŭskultante la laŭtan legadon kaj dolĉan kanton de la infanoj, la vilaĝanoj ekradiis de ĝojo.

En la jaro 1982 Li Hongfeng trapasis la ekzamenon por la Harbina Politekniko kaj fariĝis la unua studento de la vilaĝo. La sciigo pri eniro en la nomitan politeknikon estis skribita sur maldika papero, tamen ĝi estis tre peza en la manoj de Li Hongfeng. Li memoris, ke kiam li volis forlasi mezlernejon pro la forpaso de la patro kaj malfacila vivo de la familio, la vilaĝa estraro donacis monon al lia familio. Najbaroj alterne helpis al lia familio kolekti brullignon kaj kulturis la laŭkontrakte kulturatajn terpecojn de la



La lernejo de la vilaĝo Dayuancun sub maljuna ginko

familio, por ke li senzorge studu en la lernejo. En la jaro, kiam li sin preparis por la enira ekzameno, la vilaĝestro speciale invitis instruiston por lin helpi. Li ne povas forgesi la profundan senton de la vilaĝanoj.

Kiam la vilaĝestro tenis la sciigan paperon, larmoj gutante fluis laŭ liaj vizaĝsulkoj. Li laŭte kriis al la maljunaj ginkoj: "Aperis intelektulo en Dayuancun..."

La vilaĝo faris festenon por gratuli Li Hongfeng. Vilaĝestro Li Kehui verŝis glason da vino sur la teron ĉirkaŭ la ginkoj por karmemori la maljunan intelektulon. Li kun ĝojo diris: "Prapatroj, hodiaŭ nia vilaĝo havas studenton kaj estonte havos eĉ doktoron." Ĝis 1986, la vilaĝo Dayuancun kun 200 familioj havis jam 31 studentojn kaj lernantojn de teknikaj mezlernejoj. Ili senzorge kaj tutanime studas en altaj lernejoj de Pekino, Kantono, Shenyang kaj Kunming ĝuante ĉiujare subvenciojn de 300 juanoj de la vilaĝo.

Oni demandis Li Kehui: "Ĉu vi povas disponi iun ajn el la studentoj, por kiuj la vilaĝo elspezas multe?"

Verŝajne, en la estontaj kelkaj jaroj, universitataj diplomitoj ne povos esti disponigitaj al la vilaĝo. Tion Li Kehui antaŭvidis. Li diris: "Tio estas komprenebla, ĉar nun al la ŝtato mankas talentuloj. Sed mi kredas, ke certe venos la tago, kiam ankaŭ al nia vilaĝo estos disponigitaj universitataj diplomitoj."

Printempe de 1987, apud la ginkoj leviĝis novtipa domo. Tio estas la vilaĝa infanĝardeno. Nun la infanoj kiel anĝeloj ĝoje vivas kaj distriĝas en sia paradizo. Ili havas jam tute malsaman sorton ol iliaj gepatroj. Se nur ili diligentos, ilin atendos elementa lernejo, mezlernejo kaj universitato. ■

Rakonto pri filatelaĵoj

SE mi skribos historion pri rilatoj inter la ĝemelaj urboj Ningbo kaj Aachen, mi certe prezentos jenan rakonton pri filatelaĵoj.

Oktobre de 1988, de la 75-a numero de "La Verda Lupeo-Fenikso" eldonita de la Esperanto-Ligo Filatelista-Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj mi informiĝis, ke inter la 10-a kaj la 13-a de majo 1984 la poŝtoficejo de Aachen speciale uzis memorigan poŝtstampon ĉefe kun emblemo de la Internacia Polica Asocio (IPA) por festi la 25-an datrevenon de la fondiĝo de Aachen-branĉo de la germana filio de IPA. La emblemo portas Esperantajn vortojn "servo per amikeco".

Tio forte altiris min ne nur pro tio, ke mi estas fervora kolektanto de Esperantaj filatelaĵoj, sed ankaŭ pro tio, ke la poŝtstampo estas emisiita de Aachen, kiu estas ĝemela urbo de Ningbo, mia hejmloko. Tamen mi estis klara, ke ne longe daŭras distribuado de tiuspeca memoriga poŝtstampo kaj kolekti ĝin estas malfacile. Tiam mi ekpensis pri mia germana korespond-amiko Wolfgang Bienen, prezidanto de la Aachen-a Esperanto-Salono. Eble li povos helpi min tiuflanke! Sekve mi skribis al li en Esperanto.

En la komenco de 1989 mi ricevis leteron el Aachen. Mi malfermis la koverton kaj konataj Esperantaj vortoj frapis miajn okulojn, kaj mi voĉlegis de ĝojo. La ovala memoriga poŝtstampo estas orde farita sur plaĉa kaj eleganta poŝtkarto kun la sama temo.

Mi foje-refoje legis la leteron kaj emociiĝis, ke la poŝtstampo estas ne facile akirita.

S-ro Bienen estas emerita laboristo kaj pia katoliko. Kvankam maljuna, li ankoraŭ aktivas en socia aktivado. Nun li estas konsilanto en la registaro de Aachen pri aferoj rilataj kun ĝemelaj urboj. Li opiniis, ke disvolvo kaj pliintimigo de rilatoj inter ĝemelaj urboj dependas ne nur de oficialaj delegacioj de ambaŭ registaroj, sed ankaŭ de kontakto de la ordinaraj popoloj de ambaŭ urboj. Li ĉiam estas helpema, tial li estas multe respektata. Kvankam li neniam kolektis filatelaĵojn, tamen li prenis serĉon de la memoriga poŝtstampo por mi kiel servon al sia ĝemela urbo.

Ricevinte mian leteron, li tuj veturis per aŭto al



Memoriga poŝtstampo uzita de la poŝtoficejo de Aachen

la ĝenerala poŝtoficejo de Aachen por demandi. Ĝia laboranto, post serĉo en arkivoj, respondis al li, ke en la poŝtoficejo ne restas specimeno de la poŝtstampo, kaj proponis, ke li kontaktigu kun filatelistoj. La sekvan tagon s-ro Bienen aperis en la Filatela Klubo de Aachen. Ankaŭ ĝia prezidanto estis fervora. Li donis al s-ro Bienen pli ol 20 adresojn de siaj klubanoj. Poste s-ro Bienen telefonis al tiuj klubanoj kaj eĉ vizitis ilin, sed li akiris nenion. Fine li iris al la Aachen-a Policejo por demandi. Lin akceptis s-ro H. Franke, membro de la konsilantaro de IPA kaj estro de la Aachen-a Policejo. Li komprenis ĉion, nur post kiam s-ro Bienen rakontis al li pri la ĝemela urbo Ningbo de Ĉinio, Esperanta poŝtstampo k.a. "Ha, ĝuste mi havas kelke da tio..." S-ro Franke elektis la plej bonan poŝtstampon kaj petis, ke s-ro Bienen transdonu ĝin al la filatelisto de la ĝemela urbo.

Mi bone konservas la eksterordinaran donacon. Kaj poŝte en ĉiu nia filatela ekspozicio mi metis ĝin sur okulfrapan lokon.

Printempe de 1989 mi ricevis du ekzemplerojn de "Informilo de IPA", organo de Aachen-branĉo de IPA, senditajn de s-ro Bienen. En la januara numero de 1989 aperis la novaĵo "Nia memoriga poŝtstampo ŝatata de Ningbo" skribita de raportisto Hans Lux. La artikolo rakontas ne nur multe pri la memoriga poŝtstampo, sed ankaŭ iom pri la korespondo inter la Aachen-a Esperanto-Salono kaj la Ningbo-a Esperanto-Asocio ekde 1986. La raportisto nomis tion "bona komenco de kontaktigo inter la popoloj de Aachen kaj Ningbo". En la februara numero de 1989 aperis, krom la artikolo "Donaco de Ningbo" skribita de Lux, ankaŭ foto pri la donaco — poŝtmarkoserio, kiun mi sendis al s-ro Franke por danki lin.

Poste s-ro Bienen skribis al mi: "Post kiam la rakonto pri poŝtmarkoj aperis en la gazeto, ĝi diskonĝis en Aachen kaj eĉ inter la policistoj de Germanio. Nemalmultaj junuloj de nia urbo deziras korespondi aŭ interŝanĝi poŝtmarkojn kun samaĝuloj en Ningbo. Mi petas vin helpi ilin. Ankaŭ s-ro Franke esprimis, ke li volas fariĝi via amiko. Sed mi diris al ili, ke antaŭ ĉio ili devas ellerni la internacian artefaritan lingvon Esperanto." Fine li skribis: "Aachen bonvenigas vin!"

Mi esperas, ke la rakonto pri filatelaĵoj aldonos pli belajn paĝojn. ■

Ŝipkon- kurso en Qintong

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de LING YOUJUAN

MALGRAŬ kaprica vetero en aprilo, jen varma, jen malvarma, en la urbeto Qintong de Taixian-gubernio, Jiangsu-provinco, oni vidis imponan scenon de ŝipkonkurso sur la lago Qintong.

Ĉirkaŭ la sepa matene, kiam mi venis al tiu antikva urbeto de pli ol 2 000 jaroj, mi vidis, ke zorge ornamitaj ŝipoj de diversaj formoj estis veturantaj al Qintong-lago. La klaraj riveretoj fariĝis fonto de gaja rido, tamburado, "ho ruk"-krio kaj plaŭdado. Sur la ŝipoj flirtis diversformaj flagoj, oblongaj, triangulaj, kiuj surhavis nomojn de la vilaĝo.

Guberniestro Shen Zichen diris al mi, ke la ŝipkonkurso estas tradicia aktivado okazanta ĉiujare en la 4-a aŭ 5-a de aprilo. La tradicio formiĝis en la Suda Song-dinastio (1127-1279 p.K.) ĉefe por kulti diojn. En la lastaj jaroj la ŝipkonkurso jam fariĝis kultura kaj sporta aktivado, tre alloga por turistoj en- kaj eksterlandaj. La Ŝtata Turisma Buroo de Ĉinio prenis la ŝipkonkurson de Qintong

kiel unu el la aktivadoj por "Viziti Ĉinion en 1992".

La ŝipoj estis movataj per hokstangoj aŭ remiloj. La ŝipoj movataj per hokstango ĝenerale estis pli grandaj, veturigataj de fortaj viroj. Al la pruo kaj pobo alligiĝis bambuoj, kiuj beligis la ŝipojn kaj ebligis al ili enteni pli da homoj. Ĉefŝipisto direktis ŝipon per ĉefstango, dum aliaj gongadis sub la direktado de la ĉefstango. La rudristo manipulis rudron ĉe la pobo. Dekoj da ŝipistoj tenis po unu hokstangon kun ruĝa silko sur la pinto. Je la starto la ŝipoj sage flugis antaŭen manipulate de viroj en nacia kostumo aŭ kostumo de antikva gusto. La intensa konkurado plene manifestis la bravecon kaj strebemon de la gefiloj de la akvlando. Kiam finiĝis la konkurso la ŝipistoj revenis kun granda ĝojo. Rigardante la akordan remadon, mi havis impreson, kvazaŭ ili ne remas, sed faras artan prezentadon.

La ŝipkonkurso altiris amason da rigardantoj. Tiutage centmil homoj ĉirkaŭis la lagon. Ses membroj de tri generacioj de iu familio atingis la urbeton antaŭtage kaj noktis

ĉe parenco. Frue en la sekvanta tago ili venis al la lago kaj okupis bonan lokon. 81-jara maljunulino loĝanta 15 kilometrojn fore tre ŝatis la ŝipkonkurson kaj alvenis akompanate de siaj filo kaj bofilino per ŝipo de la vilaĝo.

La ŝipkonkurso estis intensa, dum la prezentado sur florŝipoj estis ĉarme delectinda. La florŝipoj ornamitaj per koloraj flagoj kaj lanternoj iris tuj ĉe la bordo, kaj sur la ŝipoj kamparanoj alivestitaj prezentis belajn dancojn, folklorajn kantojn kaj lokajn operojn. La drakŝipoj estis ornamitaj pli bele. Sur ili oni prezentis "Akvoŝprucado de drako", "Amuziĝo de drakoj per globo" k.a. Sur la ŝipoj dancadis blankaj, flavaj kaj rozetaj drakoj. La prezentado de "virintenta ŝipo" enhavis eĉ intrigon.

Ĝi konsistis el tri ŝipetoj kaj ĉiu el ili entenis nur 2-3 homojn. La unua ŝipo portis belan virinon, kiu forfuĝis kun sia amato. Ŝin sekvis la maljunaj gepatroj sur la dua ŝipo. Kaj sur la lasta ŝipo estis oficisto kaj policianoj persekutantaj la forfuĝintojn. La ŝipetoj konkurete veturis, plezurigante kiel komedio.

Ĉe la tagmezo mi suriris sur iun hokstangan ŝipon ĵus revenintan de konkurso kaj havis konversacion kun la mastro de la ŝipo kamparano Zhang Jinshan, kiu aĝis ĉirkaŭ 50 jarojn. Lia familio havas 5 membrojn kaj kulturakvaronon da hektaro da akvokampo. Antaŭ du jaroj li aĉetis betonan ŝipon kontraŭ 2 000 juanoj (5.5 juanoj egalas 1 usonan dolaron) por fari transportadon. Pere de terkulturado kaj transportado lia familio enspezis ĉiujare pli ol 10 000 juanojn. Sep tagojn antaŭ la konkurso li trejniis pli ol 20 junulojn de sia vilaĝo 6 tagojn per sia ŝipo, kaj frue venis tiutage al la konkursejo. Mi demandis lin, kial li estas tiel fervora por la ŝipkonkurso. Li diris al mi apogante sin sur la longa hokstango: "La vivo boniĝis kaj mi volas amuziĝon. Prenante la hokstangon, mi tuj sentas, ke mi juniĝis dek jarojn." ■



Konkursantoj

Prezentado de loka teatro sur ornamita ŝipo

Spektantoj





Konkurso de ŝipoj movataj per hokstangoj

La impona aspekto de ŝipkonkurso



Vizito al Ningbo

NINGBO estas fama havenurbo ĉe la sudorienta marbordo de Ĉinio. Ĝi estas ankaŭ unu el la 14 malfermitaj marbordaj urboj. Ĝi havas profundan havenon, fekundan grundon, abundajn produktojn, belajn pejzaĝojn kaj brilan kulturon.

ŜANĜIĜOJ SUR KOMERCA STRATO

Se oni demandas, kiuj lokoj estas la plej vigla kaj movoplena en Ningbo, la ningbo-anoj certe respondas kun fiero: La strato Jiangsha kaj Sanjiangkou.

Sanjiangkou estas kunfluejo de tri riveroj. Ĝi kaj la najbara strato Jiangsha formis la prosperan komercan kvartalon. Tie funkcias vendejoj unu apud alia, navetas ŝipoj sur riveroj, bonodoras floroj kaj verdas arboj en la ĉerivera parko. Jen, ĉarma pejzaĝo.

La loĝkvartalo Danfeng

Iu maljuna elmigrinta ĉino, kiu revenis en la patrujon, diris kun profunda sento: "Nun estas nere-konebla la strato Jiangsha kompare kun si antaŭ pli ol 40 jaroj. Neniu loko en la mondo pli belas ol nia Jiangsha."

La malnova komerca strato Jiangsha estis nur 5-6 m. larĝa. Tie dense viciĝis butikoj de sudaj kaj nordaj manĝaĵoj, privataj bankoj kaj vendejoj de fiŝoj freŝaj kaj peklitaj. Ambaŭflanke de la strato staris malaltaj kadukaj lignaj kabanoj kaj veturis lignaj velŝipoj sur rivero. Komerca kolapso en 1935 bankrotigis 31 privatajn bankojn sur la strato. Poste la strato plene ruiniĝis de milita tumulto.

En la lastaj pli ol dek jaroj okazis grandaj ŝanĝigoj sur la strato Jiangsha kaj Sanjiangkou. La magistrato investis 23 730 000 juanojn kaj konstruiĝis tri pontegoj super la rivero. Ili kiel ĉielarkoj pendantaj super la urbo Ningbo

multe ŝanĝis la fizionomion de la malnova urbo kaj akcelis disvolviĝon de la komerca kvartalo.

Mi promenadis sur la strato Jiangsha. Okcidente de ĝi staras altaj domoj konstruitaj post 1983, inter ili estas magazeno kun ĉ. 9 000 specoj da varoj, luksaj hoteloj kun entreprenoj komerca, manĝaĵa kaj amuza, ekspona domo de industriaĵoj, Ĉina Banko, fridiga kompanio k.a.

Oriente de la strato plene malaperis la antaŭaj konstruaĵoj. Plenumiĝis en 1988 kaj 1990 respektive la unuaperioda kaj duaperioda konstruadoj de la Parko Jiangsha, sekve la strato Jiangsha plilarĝiĝis je 30 m. En la parko estas fontanoj, skulptaĵoj, pavilonoj kaj kioskoj. En ĝi oni promenas, ripozas kaj solenas la Lanternan Feston kaj Aŭtunmezan Feston.

Rigardante de pavilono en la



parko, oni vidas la konstruatan Pontegon Ningbo, kies impona turo superstaras la tutan urbon. Rigardante sudorienten, oni vidas ke kelkaj altaj konstruaĵoj trans la rivero estas en intensa konstruado. En konstruado estas ankaŭ la verda zono ĉe Sanjiangkou.

Ŝanĝiĝoj sur la strato Jiangsha vidiĝis ne nur en la konstruaĵoj, sed ankaŭ en multaj aliaj flankoj. La antaŭa Jiangsha-strato prosperis ĉefe pro koncentriĝo de privataj bankoj. Tiam ĝi estis rigardata kiel "financa centro". Nun ili jam estas anstataŭigitaj per la ŝtata banko, Ĉina Banko. Antaŭe tie la komercaj rilatoj estis limigitaj kaj entreprenoj malgrandaj, sed nun tie estas grava komerca kvartalo, kie oni faras rektan komercadon kun multaj landoj kaj regionoj. Nun Ningbo havas rektajn komercajn kontaktojn kun 90 landoj kaj regionoj.

POR LOĜI KOMFORTE

Irante okcidenten laŭ la strato Jiangsha, ni venis al la nova vilaĝo Danfeng. Ĉiuj, kiuj venis tien, estis senescepte altirataj de la ĉarma medio de la loĝkvartalo, laŭdante ke ĝi estas tiel "bela kiel pentraĵo".

Meze de la loĝkvartalo estas la Centra Parko. Ĉirkaŭ ĝi staras divers-formaj domoj en malsamaj stiloj, kiuj rompita la monotonan aranĝon de la loĝdomoj.

Rigardante de sur altaĵo, oni vidas domojn proksimajn kaj mal-

proksimajn en la urbo. Ili estas 50 novaj vilaĝoj konstruitaj en la lastaj dek jaroj. Kun tiuj novaj vilaĝoj kiel la ĉefa parto la nova loĝkvartalo havas konstruan areon de 3 850 000 kvadrataj metroj. Duono de la urbanoj de Ningbo jam fiksloĝiĝis tie.

Koncerna departemento malkaŝis, ke en la venontaj dek jaroj oni turnos sian atenton al plibonigo de la kvalito kaj medio en la domkonstruado kaj faros ĉion eblan por perfektigi diversajn apartamentajn kaj komunajn instalaĵojn, kiaj elementa lernejo, infanĝardeno, magazeno, hospitalo, foiro kaj vendejo de greno kaj oleo.

Responde al la bezono de por-domalfermo, la ĝardenosimila vilaĝo Gaotang, la unua projekto en Ningbo investata de Ĉinio kaj alia lando, estas en streĉa konstruado. La vilaĝo kun areo de 42 000 kvadrataj metroj havas diversstilajn ĝardeneskajn vilaojn kaj etaĝajn pensionojn. Tie funkcias magazeno, banko, drinkejo, restoracio, garaĝo, gimnastejo, tenisejo, banejo kaj naĝejo. La vilaĝo liveros loĝejojn al elmigrantaj ĉinoj kaj iliaj parencoj kaj oficejojn al delegitaro de entreprenoj investataj de ĉinaj kaj alilandaj komercistoj en Ningbo.

PARADIZO DE KAMPARANOJ


La ŝanĝiĝoj de Ningbo okazis ne


nur en urbaj kvartaloj, sed ankaŭ en vilaĝoj. Veturinte per aŭtobuso 20 minutojn, mi atingis la urbeton Wuxiang. La urbeto estas relative evoluinta en ekonomio inter la 46 000 urbetoj de la lando. La urbeto havas 14 000 kamparanojn, kiuj enspezas po 1 445 juanojn ĉiujare. Tie 5 000 kamparanoj jam transloĝiĝis en novajn loĝejojn. Iuj fariĝis bonhavaj. Mi vizitis kelkajn domojn. En ĉiu domo la teretaĝa ĉambro estas pargetita kaj supraetaĝe la planko estas tapiŝita. La domoj estas instalitaj per programrega telefonio kaj televidiloj kun fermita cirkvito.

Por riĉigi la postlaboran kulture vivon de kamparanoj, la urbeto Wuxiang elspezis 500 000 juanojn en 1986 por konstrui kamparanan amuzejon kun areo de 4 800 kvadrataj metroj. La amuzejo taŭga kaj por junuloj kaj por maljunuloj estas ĉirkaŭita de akvo triflanke. Interne de ĝi ŝprucas fontano, prosperas floroj kaj verdas gazono en la tuta jaro. Vespere oni tie ĝuas Ningbo-an operon, Ŝanhajan operon aŭ rakontan kantadon en Suzhou-dialekto, aŭ legas librojn en legoĉambro. En la unua etaĝo de la amuzejo estas ĉambro de elektronikaj ludiloj, halo de teniso, tabloteniso k.a. Tie ofte aŭdiĝas rido kaj ĝoja krio de infanoj. Kamparanoj nomas ĝin sia paradizo. ■

Kamparana biblioteko de la urbeto Wuxiang

Surstrata stando de frandaĵoj en loka gusto





Bronzaĵo inkrustita per oro kaj arĝento en formo de tigro voranta cervon de Zhongshan-regno en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno, elterigita en Pingshan-gubernio, Hebei-provinco

LI JINYUN:

Antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio

ĈINAJ bronzaĵoj estas ne nur belaj artaĵoj, sed ankaŭ materialoj por studi la antikvan civilizacion de Ĉinio.

Novaj arkeologiaj fruktoj konigas, ke la origino de la ĉinaj bronzaĵoj datigis almenaŭ de 3 000 jaroj a.K. En la okuloj de la nunaj ĉinoj la bronza glavo elterigita en Linjia, Dongŝjang-nacia Aŭtonoma Gubernio, Gansu-provinco, estas la plej antikva bronzaĵo. Estis multspecaj erlitou-kulturaj bronzaĵoj, kiam regis Xia-dinastio (21-16-a jc. a.K.), kiaj glavo, borilo, ĉizilo, sagpinto, fiŝhoko kaj tintilo. Kaj estis ankaŭ kompare grandaj ujoj kaj armiloj, kiaj tripieda kuirilo *ding*, ronda tripieda vinujo *gǐu*, tripieda vinujo *gǐue* kaj longtenila armilo *ge*. Vinujo *gǐue* estas la plej ofte vidata bronzaĵo. Ĝi, plena de strioj, estas maldika. Estas bronza medalo inkrustita per turkisoj, kiuj formis figurojn de mita sovaĝbesto *taŭtje*. Tio montras aspiron de antikvaj ĉinoj al belo.

La ruino Yin de Anyang, Henan-provinco, estis ĉefurbo de Shang-dinastio (16-11-a jc. a.K.) en la lasta periodo. Ekde la mezo de la 19-a jc. oni trovis tie amason da bronzaĵoj. Printempe de 1976 oni trovis aristokratan tombon de Shang-dinastio norde de Xiaotun-vilaĝo en la ruino Yin, t.e. la tombon n-ro 5. Ĝi restis en bona stato. En ĝi oni trovis bronzaĵojn, jadaĵojn, ostaĵojn, eburajn skulptaĵojn kaj aliajn objektojn. Sole la bronzaĵoj estas pli ol 200. Delikate faritaj en belaj formoj kaj serioj, tiuj bronzaĵoj ne estis viditaj antaŭe en la ruino Yin. Tie troviĝis ankaŭ grandaj bronzaĵoj, ekz. la kvadrata *ding* 80 cm. alta kaj 117.5 kg. peza. La kurioza

vinujo *oufangji*, unu m. longa, similas al palaco. Inter tiuj bronzaĵoj estas ankaŭ antikva ronda manĝujo kun du ansoj *guy*, kuirilo *jan*, vinujo *zun*, kruĉoj, barelforma ujo *foŭ*, kornoforma vinujo *gong*, *gǐu*, krucforma vinujo *he* kaj plado, sur kiuj vidiĝas la vortoj Fu Hao aŭ Hou Mu Xin. Post esploro fakuloj konstatis, ke Fu Hao estis unu el la edzinoj de Wu Ding, reĝo de Shang-dinastio. Fu Hao estis generalino fama siatempe.

Oktobre de 1990 en Guojia-vilaĝo, ĉe la ruino Yin, oni trovis bone konservitan mezgrandan tombon de Shang-dinastio. El ĝi oni elterigis 288 bronzaĵojn, kiaj liturgia ilaro, muzikilo, laborilo kaj armilo. La 40 bronzaĵoj liturgiaj iloj estas plenaj de belaj strioj kaj surskribaĵoj ekstere. El ili estas multaj belformaj kvadrataj bronzaĵoj. Estas tre interese, ke en iu kvarpieda bronza *ding* oni trovis viandon ne tute putriĝintan, kio estas malofta en la arkeologiaj prifosoj.

Kiam la kulturo de Shang-dinastio atingis sian kulminon de la disvolviĝo, ĝi multe influis la mezan parton de la nuna Jiangxi-provinco, kion ni konis el la giganta tombo de Shang-dinastio, prifosita en 1989, en Xingan-gubernio, Jiangxi-provinco. El ĝi oni akiris 484 bronzaĵojn, inter kiuj estis liturgia ilaro, muzikiloj, armiloj, laboriloj, terkulturiloj k.a. Samkiel en la tombo de Fu Hao, iuj bronzaĵoj liturgiaj iloj estis tre imponaj por montri la altrangecon de la enterigito. Tie estis giganta kvadrata *ding* proksimume unu metron alta kaj giganta kuirilo *jan*, 1.1 metrojn alta. Tie elteriĝis ankaŭ bronza duonkuŝanta tigo 25.5 cm alta, kun elstaraj okuloj, dikaj

brovoj, larĝe malfermita faŭko. Sur ĝia dorso staras birdo. Tie oni elfosis multajn platpiedajn *ding*, sur kiuj vidiĝas reliefitaj drakoj. Multaj bronzaĵoj estis ornamitaj per kuŝanta tigro, staranta cervo kaj hirundvostaj strioj. Ĉio ĉi montris fortajn lokajn trajtojn. El la tombo oni trovis multspecajn bronzaĵajn armilojn, kiaj granda hakilo *jue*, malgranda spado, multajn bronzaĵajn laborilojn kaj terkulturilojn. Tiuj objektoj montras, ke tiam la metio kaj agrikulturo estis bone disvolviĝintaj. La elteriĝo de bronza soko markis, ke ĉinoj ekuzis plugilojn jam en Shang-dinastio.

Sur la Chengdu-a Ebenajo, kie la antikvaj sichuan-anoj, aktivadis, oni plurfoje elfosis bronzaĵojn. En 1986 oni trovis du kavojn por kultado en Sanxingdui, Guanghan-gubernio. En tiuj kavoj oni elterigis proksimume mil historiajn objektojn, inter kiuj estas giganta bronza arbo kun floroj, fruktoj, birdoj kaj bestoj sur si. La masko havas larĝan vizaĝon kaj frunton, grandajn okulojn kaj longan nazon, dum la skulptita homo havas dikajn brovojn, staranta sur nudaj piedoj. Tiu ĉi brila antikva bronzaĵo multe interesis la publikon.

Oni elterigis ankaŭ bronzaĵojn de la Okcidenta Zhou-dinastio (11-a jc. — 770 a.K.). En Fufeng kaj Qishan, Zhou-dinastiaj ruinoj de Shaanxi-provinco, oni trovis multajn gravajn bronzaĵajn objektojn. En 1960 oni trovis 39 bronzaĵojn en kelo en la vilaĝo Qijia, Fufeng-gubernio, inter ili estas braceleto, *ding*, *guy*, kuirilo *li* kaj *jan*, kruĉo, plado k.a. Sur iuj estas longa epigrafo. En 1974 oni elterigis 5 bronzaĵojn en Qiangjia-vilaĝo, Fufeng-gubernio, sur iu *ding* legiĝas 197-ideograma epigrafo.

En 1976 oni trovis kelon da bronzaĵoj de la Okcidenta Zhou-dinastio en Zhuangbai-vilaĝo de

Bronza tripieda *ding* de Shang-dinastio elterigita en la gubernio Xinggan, Jiangxi-provinco



F u f e n g - gubernio kaj akiris tie 103 bronzaĵojn. Inter ili estis plado *Shiqiangpan*, kun longa epigrafo el 284 ideogramoj, kiuj konigis la ĉefajn aktivadojn de 6 reĝoj de la Okcidenta Zhou-dinastio. La epigrafo estas utila por solvi multajn malfacilajn problemojn en la historio de la Okcidenta

Zhou-dinastio. Tie elteriĝis ankaŭ multaj gravaj bronzaĵoj de tiu ĉi periodo, kiaj manĝujo *liguj* elterigita en Lintong, Shaanxi-provinco, kaj vinujo *hezun* elterigita en Baoji, Shaanxi-provinco, kies epigrafoj estas utilaj por esplori la historion.

La tombaro de Guo-regno trovita en Shangcunling de la urbo Sanmenxia, Henan-provinco, en 1956, apartenas al Zhou-dinastio kaj la frua periodo de Printempo kaj Aŭtuno. Tie oni elfosis multajn historiajn objektojn, el kiuj estas pli ol 200 bronzaĵoj. La bronzaĵo en la tombo n-ro 1502 havas la nomon de la kronprinco de Guo-regno sur si. Tio konfirmis la identecon de la enterigito. En 1990 oni trovis aliajn grandajn tombojn de Guo-regno en tiu ĉi loko. Inter la valoraj historiaj objektoj estas 2 400 bronzaĵoj. Sole en la tombo n-ro 2001 oni trovis 1 700 bronzaĵojn, el kiuj estas 56 bronzaĵaj liturgiaj iloj kaj sur 30 el ili vidiĝas epigrafo. La liturgia ilaro konsistas el 9 *ding*, 8 manĝujoj *guy* kaj 8 kuiriloj *li*. El tio oni konjektis, ke la enterigito en la tombo eble estis estro de Guo-regno. En la tombo n-ro 2009 oni trovis pli da historiaj objektoj ol en tiu de n-ro 2001. El la pli ol 200 elfositaj bronzaĵaj liturgiaj iloj estas 8 cilindroformaj sonoriloj *jonggong* kaj 8 ansohavaj sonoriloj *niugong* kaj unu bronza frapilo *naŭ*. Sur pluraj sonoriloj estas vortoj, laŭ kiuj oni povas scii, ke tiu estas tombo de estro de Guo-regno. En tiuj du tomboj oni trovis ankaŭ feran spadon kun bronza tenilo kaj kupran batalilon *ge* kun fera klingo.

En 1978 oni trovis tombon de la markizo Yi de Zeng-regno en Leigudun-vilaĝo, Suixian-gubernio, Hubei-provinco, kaj de tie akiris liturgiajn ilojn, muzikilojn, armilojn, oraĵojn kaj jadaĵojn. Ĝi estas tombo de frua periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). En tiuj objektoj la plej rimarkinda estas gamo-sonorilaro konsistanta el 64 pecoj, kiuj pendis sur ligna-kupra L-forma framo, je tri tavoloj laŭ la grandeco. En 1987 oni elfosis belajn bronzaĵojn el tombo n-ro 251 en Jinsheng-vilaĝo, proksime de la urbo Taiyuan, Shanxi-provinco. Inter la elfositaj objektoj estis bronza birdo plene gravurita je plumoj. Ĝi staras kun alte levita kapo. Sur ĝia dorso estas tigroforma tenilo. Sur tiuj ĉi bronzaĵoj vidiĝas gravuritaj desegnoj de figuroj de mitaj bestoj. Ili reprezentas la metiartan nivelon de la bronzaĵoj en la posta periodo de Printempo kaj Aŭtuno.

Meze de la 70-aj jaroj arkeologoj prifosis grandajn tombojn de la regno Zhongshan en la periodo de Militantaj Regnoj en la gubernio Pingshan, Hebei-provinco. Inter tiuj la tomboj n-roj 1 kaj 6 estas la plej gravaj. Inter la elfositaj bronzaĵoj estas 90 pecoj kun epigrafo. Tie estas *ding*, kvadrata kruĉo, ronda kruĉo kaj bronza arkitektura plano, la plej frua en la ĉina historio. Sur iuj objektoj la epigrafo estas longa, sed antaŭe oni opiniis, ke sur bronzaĵoj

(Daŭrigo sur p. 43)

Reciprokutila kontribuado

de VLADISLAV STEPURA (Ukrajno)

Kiam mi lernis en mezgrada lernejo, de tempo al tempo en mia amika rondo okazis interparolado pri nia estonta laboro. Unu el miaj amikoj diris: "Mi volas fariĝi fervojisto, ĉar fervojistoj ricevas belan uniformon." Sed la sorto kondukis lin poste en kombajnouzinon de urbo Ĥerson — unu el la regionaj centroj de Ukrainio. Li estis ĉiam kontenta pri sia laboro, sed iajfoje li ŝerce diris: "Ĉi tie ĉio estas bona, krom la uzino, ĉar bedaŭrinde en tiu ĉi uzino oni ne donas uniformon."

Pasis la jaroj. Multo aliĝis ĉirkaŭe. La Ĥersona kombajnouzino transformiĝis en kombajnoproduktan unuiĝon.

Antaŭ nelonge mi renkontis la amikon. Li ridetadis. Mi demandis lin mire:

"Kial vi gajas, kiam ĉiuj plendas pro multfoja altigo de prezoj?" kaj aldonis ŝerce: "Eble en via unuiĝo oni donas uniformon?"

La amiko respondis:

"Jes, ni ricevas bonegan uniformon."

"Vi ŝercas?" demandis mi.

"Ne, mi ne ŝercas."

"Kian uniformon do oni donas al vi?"

"La ĉinan."

"La ĉinan?"

"Jes."

Ĉe tiuj ĉi vortoj mi staris silente kun okuloj larĝe malfermitaj pro miro.

La amiko ekridetis, elmetis el sia aktaĵo ĵurnalon kaj donis ĝin al mi parolante:

"Legu, kaj poste ĉion vi komprenos."

Tio ĉi estis la unua numero de nova ĵurnalo "Kie, kio, kiam?". Mi legis el la ĵurnalo, ke labora kolektivo de Ĥersonaj kombajnokonstruistoj starigis senperajn interrilatojn kun pluraj eksterlandaj firmaoj, precipe kun tiuj en la popola Ĉinio. Sur maizaj kampoj de Ĉinio jam laboras centoj da Ĥersonaj kombajnoj. Interŝanĝe la kolektivo de Ĥersona Kombajnoprodukta Unuiĝo ricevas el Ĉinio vestojn, ŝtrumpojn, termosojn, magnetofonojn kaj aliajn.

La eksterlandan komercon faras



"Ĥerson-kamparmaŝin-eksporto" de Ĥersona Kombajnoprodukta Unuiĝo. Tiu ĉi eksterkomerca firmao ofertas ankaŭ efektivajn teknologiojn. En la pasinta jaro, post kiam la ĉinaj kamparanoj uzis la Ĥersonajn maizrikoltajn kombajnajn, ili alte taksis la ukrainan teknologion de maiza rikolto, ke ĝi estas la plej efektiva, plej akceptebla en la mondo.

Ĉi-jare la firmao "Ĥerson-kamparmaŝin-eksporto" liveros al ŝtataj kaj aliaj farmoj de Ĉinio centojn da memmovaj kaj kuplataj kombajnoj. Ĉi tiu firmao efektivigos teknikan servon de siaj kamparmaŝinoj. Por tio en Ĉinion venados spertaj specialistoj de Ĥersona Kombajnoprodukta Unuiĝo. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondukuponoj por kvin vortoj aŭ mallongiĝoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* En la provinco Hubei, centra Ĉinio, emergis nova promesplena industria urbo Shiyang. Ĝi ĝuas renomon en Ĉinio pro debithavaj ŝarĝaŭtoj faritaj de la Dua Ĉina

Aŭtofabriko kaj estas konata kiel aŭtourbo.

La menciita fabriko, kie aktivigas esperantistoj, tre deziras pere de Esperanto starigi kontaktojn kun aŭtourboj de aliaj landoj, precipe de Britio, Italio, Germanio, Svedio, Hispanio, Kanado, Brazilo kaj Koreio. Kiu povas kontakti, bonvolu skribi al nia redakcio per la adreso: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio.

* Liu Jianguo interesiĝas ĉefe pri kuirarto, turismo kaj foto, vo-

lontas senpage gastigi fremdan esperantiston en sia hejmo. Adr.: Hefei Shi Dongshi Qu, Bengbu Lu 108 Hao, 230011, Anhui, Ĉinio.

* La urbo Chengde najbaras al Pekino kaj estas konata kiel somerumejo. En januaro de 1991 fondiĝis la Chengde-a E-Asocio, kaj ĝi deziras fondi kontaktojn kun alilandaj esperantistoj kaj E-organizoj en turismo, komerco kaj aliaj flankoj. Adr.: s-ro Shang Junyi, Poŝtkesto 88, Chengde, 067000 Hebei, Ĉinio.

ESP-NOVAĴOJ

● De la 10-a ĝis la 20-a de septembro 1992 la 1-a Ĉina Festivalo de Silka Vojo okazos en Lanzhou, ĉefurbo de Gansu-provinco. La Gansu-a E-Asocio kaj la Lanzhou-a E-Instituto bonvenigos ĉinajn kaj alilandajn samideanojn al la esperantista vojaĝo en la festivalo.

● Invitite de esperantistoj de Chengde, Hebei-provinco, laborantoj de EPC vizitis de la 24-a ĝis la 26-a de aprilo 1992 la Someruman Montvilaon kaj aliajn vidindaĵojn de la urbo Chengde. Vespere de la 25-a ili kunsidis kun lokaj esperantistoj.

● La 5-an de aprilo la Liuzhou-a E-Asocio de Guangxi okazigis en la komerca kvartalo de la urbo konsultiĝan aktivadon pri Esperanto, propagante Esperanton al urbanoj kaj eksponente Esperantajn legaĵojn. La 7-an de aprilo la elementa E-kurso funkciigita de la E-asocio komencis sian semestron.

● La 5-an de aprilo la Neijiang-a E-Asocio, Sichuan-provinco, okazigis sian 4-an Kongreson de Esperanto, en ĝi naskiĝis la 3-a konsilantaro de la E-asocio. La 19-an de aprilo la asocio organizis printempan ekskurson kun la temo "Sub la Verda Standardo".

● De la 18-a ĝis la 23-a de aprilo 1992 per ponto de Esperanto la komerca delegacio de litovaj entreprenistoj el 8 personoj vizitis Xi'an, ĉefurbon de Shaanxi-provinco, interparolis kun Xi'an-aj kolegoj pri komercado kaj subskribis serion da kontraktoj.

● La 12-an de aprilo la 2-a Kongreso de Esperanto de la Yunnan-a E-Asocio estis okazigita en Kunming, ĉefurbo de Yunnan-provinco. Ĝin partoprenis 50 membroj el la provinco.

● Ekde 1985 la fremdlingva fakultato de la Guangxi-a In-

struista Universitato uzas Esperanton kiel la 2-an fremdan lingvon por ekzameno de kandidatoj de magistro. Nuntempe ankaŭ la Huazhong-a Instruista Universitato, Huadong-a Instruista Universitato, Xi'an-a Fremdlingva Instituto k.a. praktikas tiun regulon. La koncerna departemento de Hunjiang, Jilin-provinco, decidis, ke ĉi-jare fakuloj povas elekti Esperanton en la fremdlingva ekzameno por promociiĝi al la mez- kaj altklasaj gradoj.

● Nova Esperanto-revuo "EVENTOJ", kune eldonata de Kultura Esperanto-Asocio kaj Lingvo-Studio, aperis ekde marto de 1992 en Hungario. La formato estas A/4, paĝonombro 8, kaj ĝi aperas 2-semajne. Abonkotiĝo por la jaro 1992 estas 49 guldenoj. "EVENTOJ" estas redaktata ne nur por hungara, sed ankaŭ por la internacia publiko. La revuo ne estas posteulo de alia eksa revuo kaj tute sendependa de Hungara Esperanto-Asocio, same de UEA kaj SAT. Tiu sendependeco signifas ne kontraŭstaron, sed morale neligitan helpovolon kaj eblecon al la Esperantaj organizoj. La adreso: H-1675 Budapeŝto, pk. 87, Hungario.

● John Wells, profesoro pri fonetiko de la Universitato de Londono, prezidanto de UEA, instruis unusemajnan someran kurson pri Esperanto ĉe la Universitato de Hartford, Connecticut, Usono, inter la 13-a ĝis la 18-a de julio 1992. Helpis lin profesoro Duncan Charters, profesoro Humphrey Tonkin kaj profesorino Jane Edwards. Partoprenantoj lernis en kursoj de komenca, mezgrada kaj alta niveloj.

● La 17-a Internacia Semajno de Esperanto okazos ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo Sète, de la 12-a ĝis la 19-a de septembro 1992. Ili havos tri nivelajn kursojn gvidatajn de eminentaj geinstruistoj, inter kiuj Pierre Babin. Ankaŭ banado, ekskursoj, interesaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo ĝojigos partoprenantojn.

● De la 21-a ĝis la 24-a de majo 1992 okazis la VI-aj Esperanto-Tagoj de Staszów en Pollando. La programo inkluzivas prelegojn, foto-ekspozicion, ekspozicion de eldonataj revuoj en la tuta mondo, ktp. Ekde la jaro 1987 ĉiujare okazas la Esperanto-Tagoj en Staszów.

La estraro de "Esperanto Mayo Klubo" la unuan sabaton de aprilo okaze de la dekjara renkontiĝo, Bogoto, Kolombio



En la halo de kalisteno

CESIS arda muziko kaj descendis de la podio trejnistino Ge Liwen tuta en ŝvito. Ŝi diris: “Mi energie trejniĝas tutjare, alie mi grasiĝos.” Ŝia parolo ridigis la apudajn knabinojn, kiuj partoprenis la trejniĝon.

Tio estis la unua trejna kurso por la pli ol 100 novaj partoprenantoj en la halo de kalisteno sub la Fizika kaj Sporta Komisiono de la Okcidenta Distrikto, Pekino. Post trejno de unu horo kaj duono, ili laciĝis tiel, ke iuj kuŝis senmovaj sur la planko. Oni mallaŭte murmuris: “Nia trejnistino estas preskaŭ kvindekjara, tamen ŝi estas pli facilmovola ol ni.” “Rigardu, kiel vigla kaj svelta ŝi estas! Sole ŝia penemo kuraĝigos min por plua ekzercado!”

Vespere venis tien aliaj junaj knabinoj, kiaj mezlernejaninoj, flegistinoj, kuracistinoj, oficistinoj, komizinoj kaj laboristinoj. Malgraŭ la malsamaj okupoj, ili ĉiuj estas firmaŝaj kaj graciaj.

ELEGANTECO DE TREJNADO

La 26-jara svelta Xiong Xiaohong estas bela oficistino de instituto en Pekino. Post laborhoroj ŝi iras al la halo kaj sin ekzercas en akompano de ritmorapida muziko. Preparajn movojn, salton, streĉiĝadon kaj reprenon de la origina teniĝo, ĉion ŝi plenumas en la daŭro de unu horo kaj duono. Ŝiaj movoj estas graciaj, kio rezultas el ŝia trejniĝo en la tuta jaro.

“Vi ja estas svelta, kial vi partoprenas en la trejnado?” mi demandis. “Svelteco ne signifas elegantecon. Oni devas graciigi siajn movojn kaj beligi la pozojn per scienca ekzercado kaj modernaj sportoj.” Tuj post kiam ŝi metis siajn piedojn en la halon, ŝi pasie sin trejnis. Ŝi maltrankviliĝas, se ŝi sin ne trejnas en unu semajno. Ĉiu

staĝo de la kalistena kurso daŭras unu monaton. Oni trejniĝas vespere, trifoje por ĉiu semajno. Tie troviĝas pluraj knabinoj, kiuj sin trejnas kiel ŝi ĉ. unu jaron.


ĜUO DE LA TREJNADO

Post trejniĝo Zeng Huihuang estis tuta en ŝvito. Ŝi diris: “Farante gimnastikajn ekzercojn, mi dronis tute en ritmorapida muziko, forgesante ĉion alian. Dume mi plene malstreĉis la muskolojn kaj mi sentas grandan plezuron.”

La 40-jara s-ino Zeng estas alta je 1.68 m. ŝi sportama, distingiĝas per bela korpostrukturo kaj fortaj muskoloj. Post pli-ol-7-monata trejniĝo ŝi fariĝis multe pli energia kaj sprita ol iam antaŭe.

Ŝi havas naŭjaran filon. Por havigi al li la kapablon vivi memstare, ŝi ordonis lin mem fari hejmtaskojn. Ŝi opinias, ke virinoj ne devas zorgi ekskluzive pri siaj edzo kaj infano. Ili devas fari ankaŭ tion, kion ili mem deziras. Ŝi partoprenas en la trejniĝo kun celo kulturi la spiriton kaj perfektigi sian memon. Ŝi diris al mi ankaŭ, ke oni devas serĉi ian


Junulinoj en trejnado





Trejnistino Ge Liwen (dekstre)

Zeng Huihuang sin trejnas.



distriĝon post la monotonaj laborhoroj.

“MI FARIĜIS KVAZAŬ TUTE ALIA”

Li Yuan rakontis al mi, kia ŝi estis antaŭ kaj post la trejniĝo. Ŝi demandis min: “Kia mi aspektas nun laŭ vi?” Rigardinte ŝin de la kapo ĝis la piedoj, mi diris: “Vi estas vigla, rozvanga kaj belfigura.” Ŝi kapjesis dirante: “Sciu, ke antaŭ unu jaro mi estis tute alia. Tiam mi estis malsanema, kun kava brusto. Iutage, pro laciĝo mi svenis sur strato. Poste mi membriĝis al la kurso de kalisteno. Komence mi ne eltenis la ekzercadon kaj preskaŭ forlasis la trejnejon. Kiam mi vidis la elegantan konturon kaj vigran aspekton de trejnistino Ge, mi devigis min daŭrigi la trejniĝon. Post tri monatoj mi fariĝis sana, energioplana, memfida kaj bonhumora. Miaj kolegoj diris, ke mi fariĝis kvazaŭ tute alia.”

PENADO POR SUKCESO

Samkiel aliaj multepromesaj gejunuloj, ankaŭ fraŭlino Wei Zan avidas sanon kaj belon.

Fraŭlino Wei estas ĉiĉeronino de turisma servo. Ŝi estas belfigura kun delikata haŭto, nigra kaj densa hararo. Krom legi, skribi, kanti kaj danci, ŝi ŝatas ankaŭ kalistenon. Ŝi diris, ke kompreneble estas grave fari fizikan ekzercadon por bone labori, sed tamen, beleco faros la homan vivon pli signifplena.

Sendube, la aktivado estas peniga por ŝi. La 27-jara fraŭlino diris al mi: “La kalisteno estas aparte laciga kaj iafoje eĉ seka. Precipe post mia taglaboro mi deziris ripozi hejme en la lito!” Malgraŭ tio, ŝi daŭrigis sian trejniĝon, eĉ en pluvaj kaj ventaj tagoj.

Fraŭlino Wei estas fidoplana pri sia estonteco. Ŝi opinias, ke la homoj devas penadi kaj klopori por sukceso.

“PREDIKANTO DE JUNECO”

La 49-jara Ge Liwen estis trejnistino de la Pekina Virina Gimnastika Teamo. Decembre de 1990, ŝi ekfunkciigis la kurson de virina kalisteno en la supre menciita halo depende de la komisiono, kie ŝi laboris. Ĝis nun 20 000 virinoj tie ricevis trejnadon.

“Nemalmultaj gejunuloj estas bele vestitaj. Sed inter ili iuj estas ĝibaj kaj anormalaj en la teniĝo. Pro kio?” Ŝi diris: “Ili ne estas trejnitaj per kalisteno, nek havas koncernajn sciojn.”

Ŝi volas, ke post ekzercado pli kaj pli multaj virinoj havu bonan ŝanĝiĝon en movo, teniĝo kaj temperamento. Konsiderante la kompleksion kaj korpan formon de ĉinaj virinoj kaj konsultante koncernajn materialojn, ŝi mem projektis kalistenan serion. Antaŭ nelonge ŝi projektis serion da movoj de kalisteno por ceremoniaj fraŭlinoj, kiu spiras la spiriton de nia epoko. La ekzercantoj gaje dancas jen rapide jen malrapide laŭ la ritmo de muziko...

Ŝi fieras pri sia laboro kaj rigardas sin kiel “predikanto de juneco kaj beleco”. Ŝi diris, ke ŝia vivo estas signifplena kaj bela. Ŝi deziras, ke la vivo estu ĉiam bela. ■

El la latina, entuziasmige

de PAULO S. TERRA (Brazilo)

Atlaso de Insekta Morfologio. Esperanta-latina-ĉina. H. Steinmann kaj L. Zombori, en la ĉinan kaj Esperanton trad. Li Kexi. Pekino, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 454 p. ISBN 7-5052-0000-3. 20cm. Bind. Prezo: 31,20 gld.

La manko de abunda faka literaturo estas certe unu el la plej gravaj problemoj por la disvastigado de Esperanto. La nuna stato de nia naturscienca literaturo povas esti taksita per la Esperanto-katalogo 1988/89, en kiu oni trovas ekzemple sub la rubriko "Fiziko" (p. 277) nur unu titolon!

Pro tio, la pionira laboro de la fakaj Esperantaj verkistoj akiras specialan gravecon kaj proprajn malfacilaĵojn. Ili devas zorgeme elekti la temon, la profundecon kaj la amplekson de la verkota aŭ tradukota teksto, tiel ke la faka Esperanta literaturo riĉiĝas pere de verko, kiu estas samtempe baza, utila kaj dum longa tempo aktuala.


Tiuj aspektoj estis konsiderataj de la ĉina entomologo ing. Li Kexi, kiu elektis por tradukado kaj adaptado verkon bazan, kompletan kaj utilan pri la morfologio de la insektoj. *Atlaso de insekta morfologio* de la entomologoj H. Steinmann kaj L. Zombori (Budapeŝto 1981) havas tre simplan strukturon. Per 757 figuroj el la entomologia literaturo estas ilustrataj centoj da eksteraj karakterizaĵoj de la korpo de insektoj. Flanke de la originalaj latinaj nomoj de la morfologiaj strukturoj, Li Kexi aldonis la ĉinan kaj la Esperantan tradukojn. La Atlaso estas facile uzbla. Ĝi povas rapide solvi dubojn pere

de la figuroj aŭ indeksoj. Ĝi povas esti uzata ankaŭ por la instruado de komencanto en entomologiaj aferoj. Sendube ĝi estas fidinda referenca fonto, kiu okupos specialan lokon sur la librobreto de la entomologoj, ĉu profesiaj, ĉu amatoraj.

Por ni esperantistoj kelkaj aspektoj meritas specialan konsideron. Estas entuziasmige vidi flanke de la antikva latina terminaro, uzita de la pioniroj de la entomologiaj studoj, la samvaloran Esperantan terminaron. Oni konstatas, ke la forlaso de la latina sistematiko kreis babelan situacion. Okaze de mia studado de la neotropikaj mantaj genroj, temo de mia doktoriĝa tezo, mi legis priskribojn de tiuj insektoj en la franca, angla,


germana, itala kaj portugala (mia gepatra lingvo), krom en la latina. Esperanto estas certe definitiva solvo por tiu problemo. La fakterminaro proponita de Li Kexi ebligas apliki ĝin fidine en la entomologia fako por tiu celo. Ja ekzistas bonegaj kaj imitindaj kontribuoj de niaj ĉinaj samideanoj. La ĉina faka revuo *Entomotaxonomia*, eldonata ekde 1981, dediĉita al la sistematika entomologio, uzas Esperanton kune kun la ĉina kaj la angla.

Kiel aldona kvalito de la Atlaso estas menciinda la antaŭparolo de d-ro C. Støp-Bowitz, zoologo kaj akademiano, kiu bonege analizas la kontribuon de Li Kexi por la necesa kaj urĝa transiro de la antikva latina terminaro al la Esperanta terminologio. ■



La unua nuklea elektrejo de Ĉinio

Teksto de **DA WEI**



La Qinshan-a Nuklea Elektrejo ĉe Hangzhou-golfo

Foto de **WENG XINGFA**

QINSHAN estis nekona-
ta dezerta monteto ĉe
Hangzhou-golfo. Legen-
do diras, ke antaŭ dumil
jaroj la Unua Imperiestro de Qin-
dinastio, kiu la unua sukcese un-
uigis la tutan Ĉinion, venis al Zhe-
jiang kaj ascendis la monteton por
revui la akvomilitistaron. Kaj pro
tio la monteto ricevis la nomon
Qinshan (Qin estas la nomo de tiu
dinastio kaj shan signifas monton).
Hodiaŭ ĉe la montpiedo Ĉinio kon-
struis sian unuan nuklean elek-
trejon — la Qinshan-an Nuklean
Elektrejon, tiel ke la monteto fami-
ĝis ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en
la mondo.

Oni komencis konstrui la nu-
klean elektrejon la 1-an de junio
1983. Kaj la 15-an de decembro
1991 la nuklea elektrejo estis fin-
konstruita kaj komencis doni elek-
tron al la elektra reto de orienta
Ĉinio. Tio finis la historion, ke
Ĉinio ne havas nuklean elektrejon,
kaj ebligis al ĝi eniri en la novan
etapon de paca utiligo de atom-
energio.

ZIGZAGA VOJO

En 1970 al la plej granda ĉina
industria urbo Ŝanhajo mankis
elektro. Tiam ĉefministro Zhou
Enlai klare montris, ke oni devas
konstrui nuklean elektrejon por
mildigi la streĉecon de elektro-
provizo. Post nelonge li persone
prezidis kunvenon por diskuti kaj
sankcii la projekton de nuklea
elektrejo de tipo de prema akva
reaktoro kun povo de 300 000 kW.

Poste aro da nukleaj specialistoj
kaj inĝenieroj komencis grandajn
esploradon kaj projektadon. Post
8-jara scienca eksperimentado kaj
teknika esplorado ili akiris pli ol
300 atingojn.

Sed dum tiu periodo la laboro
ofte interrompiĝis pro diversaj kia-
loj. Krome, pro la influo de la ak-
cidentoj de iuj nukleaj elektrejoj
eksterlande, oni neis siatempe la
planon de konstruado de nuklea
elektrejo. En aŭgusto 1982 Ĉinio
publikigis la informon komenci
konstrui la Qinshan-an Nuklean
Elektrejon.

KANTO DE LA KONSTRUANTOJ


La 1-an de junio 1983 komen-
ciĝis la konstruado de la Qinshan-a
Nuklea Elektrejo. 6 000 kon-
struantoj kaj 2 000 sciencistoj kaj
teknikistoj venis tien de diversaj
partoj de la lando. Ili per siaj ma-
noj kaj saĝo konstruis mardigon
kun longo de 1 800 m kaj starigis
cilindran nuklean insuleton 60 m
altan, fabrikon de vapor-turbinaj
generatoroj kaj aliajn akcesorajn
energio-provizajn konstruaĵojn. Ili
faris grandajn penigajn laborojn.
Nun mi citas kelkajn fragmentojn
el iliaj laboroj.

Wang Zhilin, flavvizaĝa kaj
maldika suda ĉino, estis teknikisto

de la 22-a Nukle-industria Kompa-
nio. Li estis ŝarĝita per du ŝlosilaj
taskoj: fari muldilon por hermeti-
ka ŝelo kaj konstrui betonan ŝelon.
Kiam la laboro iris arde, subite li
sentis doloron ĉe la hepato. Sed li
ne ripozis kaj daŭre laboris sur la
konstruejo. Li foje-refoje atentigis
al la laboristoj: "La hermetika ŝelo
estas la lasta barilo por malhelpi
tralikiĝon de nukleaj radioj, tial ni
devas fari ĝin atente." En marto
1987 Wang Zhilin estis portita en
hospitalon pro hepatito. Li mal-
trankviliĝis, ĉar baldaŭ venos la
ŝlosila tempo por fari betonan ku-
polon kaj li devos ellabori planon
antaŭ la fino de junio. En la du
monatoj li multfoje eliris el la hos-

La ŝtala interna tavolo de la hermetika ŝelo

Foto de ZHANG LU



pitalo malgraŭ la konsiloj de siaj gvidantoj kaj kuracistoj. Fine li prezentis la planon...

Maljuna inĝeniero Zhang Lize, nordorienta ĉino, kun grizaj haroj rigidaj kiel lia karaktero, estis teknika konsilanto de tuba trupo. Li, sperta, povas bone klarigi la funkcion de maŝino tuj post rigardo de ĝia interno. Foje, kiam oni donis al li desegnaĵon de maŝino por prilabori tubon kun V-formaj ekstremoj, li tuj kuntiris la brovojn.

"Ĉu vi scias, ke eksterlanda kompanio ne lasas rigardi faradon de la maŝino, nek donas referencan materialon pri ĝi. Por konsulto oni devas pagi 400 000 usonajn dolarojn," diris la ĉefinĝeniero al Zhang Lize. Aŭdinte tion, Zhang ekkoleris.

Reveninte hejmen, li eĉ ne volis paroli. Kaj post tritaga pripensado li elpensis la solvon kaj ekĝojis kiel infano. Li ne sekvis la rutinan vojon kaj elfaris maŝinon, kiu povas prilabori tubon kun V-formaj ekstremoj bonkvalite.

Nuklea elektrejo konsistas el sennombraj aparatoj kaj mezurinstrumentoj kaj tuba sistemo. Estas tre malfacile bone aranĝi kaj organizi ĉiujn partojn de la elektrejo. Tamen ĉefprojektisto Ouyang Yu

faris la tutan aferon tre bone. Li estas unu el la unuaj ĉinaj nukleaj sciencistoj kaj talenta organizanto kaj gvidanto. En la esplorado, projektado kaj muntado de nukleaj instalaĵoj li sukcese solvis multajn teknikajn problemojn. Li faris grandan pioniran laboron por disvolvi la nukle-elektran industrian de Ĉinio.

KVALITO ESTAS VIVO

La Qinshan-a Nuklea Elektrejo estas projektita kaj konstruita de Ĉinio mem, kio kompreneble vekis vastan atenton en- kaj eksterlande. Kaj nemalmultaj maltrankvilis kaj ne kredis tion.

La ĝenerala direktoro de la nuklea elektrejo Zhao Hong rakontis al mi, ke en la komenco de la konstruado de la nuklea elektrejo oni jam difinis la orientilon: meti la kvaliton kaj sekurecon en la unuan lokon, ne polui la teron nek damaĝi la popolon, kaj starigis relative perfektan sistemon de kvalita garantio. Viglis ĉ. 900 profesiaj laborantoj, kies laboro estis kontroli la kvaliton. La tuta konstruado de la elektrejo estis sub la severa kontrolado de la Ŝtata Nukle-asekura Buroo.

Aprile de 1986 okazis serioza tralika akcidento en la Ĉernobila

Nuklea Elektrejo, kio levis kontraŭnuklean tajdon tra la mondo. Pro tio ĉinoj multe zorgis pri la sekureco de la konstruata Qinshan-a Nuklea Elektrejo. Specialistoj venintaj el diversaj lokoj de la lando ĉiuflanke kontrolis la konstruaĵojn de la elektrejo 60 tagojn. La hermetika ŝelo estis la plej grava objekto de kontrolado. La specialistoj faris X-radian teston al ĉiuj veldjuntoj de la interna tavolo de la ŝelo kaj ekzamenis ĝian hermetikecon. Ili testis la fortikecon de la ekstera betona tavolo de la hermetika ŝelo. La specialistoj venis al konkludo, ke la konstruaĵoj de la nuklea elektrejo estas bonkvalitaj.

LA NUKLE-ELEKTRA INDUSTRIO DISVOLVIĜANTA

La Qinshan-a Nuklea Elektrejo ĉe la montpiedo kaj apud la maro estas 126 km for de Ŝanhajo kaj 92 km for de Hangzhou. Oni konstruis transsendan lineon nur dek km longan por kunligi la elektrejon kaj la elektran reton de orienta Ĉinio. Tio ludas gravan rolon por mildigi la streĉecon de elektroprovizo en tiu regiono.


S-ro Ouyang Yu diris al mi post la lanĉo de la elektrejo, ke la nuklea elektrejo estas grava ne nur pro tio, ke ĝi donas ĉiutage 7.2 milionojn da kWh da elektro, sed ankaŭ pro tio, ke en la konstruado de la elektrejo oni sisteme kaj bone ekposedis la nukle-elektrajn teknikojn, akumulis spertojn kaj elkulturis fakulojn, kio metis bonan bazon por Ĉinio disvolvi sian nukle-elektran industrian.

Krom la unuaperioda konstruado de la Qinshan-a Nuklea Elektrejo, Ĉinio konstruos ankaŭ aliajn nukle-elektrajn konstruaĵojn en la venontaj kelkaj jaroj. Sep generatoraj kompletoj de Qinshan kaj Dayawan baldaŭ eniros en plej streĉan konstruadon. Se la konstruado iros glate, ĝis la fino de la nuna jarcento la totala kapacito de la nukle-elektraj generatoroj de Ĉinio atingos 6 milionojn da kW.


Specialistoj de la Internacia Atom-energia Agentejo vizitas la ĉefan regadejon de la elektrejo.

Foto de LIU HONGYU





Muntado de reaktorujo Foto de **LIU HONGYU**




Muntado de kupolo de la hermetika ŝelo
Foto de **LIU HONGYU**

Oni ĝojas pro la sukcesa lanĉo de la nuklea elektrejo

Foto de **ZHANG LU**





La elektrejo en luna nokto

Foto de WENG XINGFA

LEVIĜAS LA NIVelo DE LA ĈINAJ MAROJ

La nivelo de la ĉinaj maroj leviĝas ĉiujare 1-2 milimetrojn. La konkludon oni faris post la analizo de la materialoj pri la mar-tajdoj de ĉ. mil tajdo-ekzamenaj stacioj de Ĉinio kaj la observado de la ŝanĝiĝoj de la marnivelo per preciza akvonivelilo.

La fakuloj opinias, ke la nivelo de la ĉinaj maroj ĝenerale estas leviĝanta kaj tion ĉefe estigas la tutmonda varmĉambra efiko kaj malleviĝo de la tero de ĉemaraj urboj kaj regionoj pro troa ekspluatado de subtera akvo. La marnivela leviĝo estas monda fenomeno.

Ĉinaj sciencistoj jam akiris la datenojn kaj tiun de rapideco de leviĝanta meznombra marnivelo de la proksimaj ĉinaj maroj kaj la topografiajn datenojn de marfundo kaj prognozis la leviĝontan meznombran altecon de la marnivelo en la jaro 2050. La datenoj servas kiel gravaj materialoj por esplori kaj analizi eblajn malutilojn de ia movado de la terkrusto kaj marnivela leviĝo.

NOVAJ KONCEPTOJ DE TIBETANOJ

Kun tempopaso ŝanĝiĝas iom post iom multaj konceptoj de la tibetanoj. Ili lernas de la loĝantoj de disvolviĝintaj regionoj por sekvi la modernigon de la socio. Tibeto estas budhisma regiono. La budhisma teorio ne mortigi vivaĵojn protektis ankaŭ fiinsektojn damaĝantajn plantaĵojn. Antaŭe, kiam aperis damaĝo de fiinsektoj en plantaj kaj legoma kampoj, la bonkoraj, piaj budhisto-kampanoj ne faris mortigon de fiinsektoj, sed ripete preĝis sur kamprando kaj ŝutis sekalgrajnojn al fiinsektoj por ilin nutri. Rezulte de tio, multe da plantaĵoj estis formanĝitaj de fiinsektoj.

Nun jam ŝanĝiĝis la stato. Kiam okazas fiinsekta damaĝo en kampoj, la kampanoj uzas insekticidon por protekti riĉan rikolton.

Antaŭe, la tibetanoj rigardis la sunon, lunon, montojn, ebenaĵojn, riverojn, lagojn kiel kultatajn diaĵojn, kaj neniam utiligis ilin por si. En la gubernio Nagarze estas lago Yamzho Yumco, kies nomo signifas "jadon sur paŝtejo". La lago kun akvoareo de 638 kvadrataj kilometroj estis rigardata kiel dia lago kaj ĉiam protektata de la

tibetaj kampanoj kaj paŝtistoj loĝantaj apud ĝi. La loka registaro planis konstrui tie hidroelektrejon, sed pro la opono de iuj loĝantoj kaj lamaoj la konstruado devigite haltis. Nun la scienco venkas la malklerecon. En la kuranta jaro, la tibetanoj jam komencis konstrui ĉi tie perpumpman energirezervan elektrejon kun kapacito de 90 000 kilovattoj.

LA PLEJ JUNA MEMBRO DE LA ĈINA VERKISTA ASOCIO

Ren Huan estas lernejanino de la Pekina Oka Mezlernejo. Lastjare, kiam ŝi estis 17-jara, rekomendite de la famaj verkistoj Zang Kejia kaj Zhang Qie, ŝi estis akceptita de la Ĉina Verkista Asocio kiel ĝia membro. Ŝi estas la plej juna inter ĝiaj 4 050 membroj.

Ŝi verkis poemojn en la aĝo de 7 jaroj, publikigis verkaĵojn en sia aĝo de 9 jaroj kaj aperigis sian unuan libron "Poemoj kaj prozaĵoj de dek-jara Ren Huan" en la sekvanta jaro. Antaŭ nelonge, la eldonejo "Virinoj kaj Infanoj" kaj la Eduka Eldonejo eldonis ŝiajn poemarojn verkitaĵojn en sia aĝo de 11 kaj 12 jaroj: "Vento en la Unua de Junio" kaj "Muzikoj por Futuro". En marto 1990, la eldonejo "Ĉinaj Infanoj" eldonis ŝian poemaron "Amo en Mia Koro — Elektitaj Liriko de Ren Huan" verkitaĵojn de ŝi en la aĝo de 13 ĝis 16 jaroj.

Siaj verkaĵoj akiris 2 internaciajn premiojn, 12 tutlandajn kaj provincajn premiojn. Inter alie, ŝia prozaĵo "Rakonto pri Hejmlando" akiris premion en la Prozaĵa Konkurso de la Infanoj Ĉinaj kaj Jugoslavaj. Ŝia poemo "La Aminda Patrujo" gajnis la premion de la Poema Konkurso de la Infanoj Ĉinaj kaj Jugoslavaj. Ŝia poemo "Hararo de Mia Patrino" okupis la unuan lokon en la konkurso "Elkoraj Kantoj de la Tutlandaj Virinoj".

Kiam ŝi estis 13-jara, ŝi estis akceptita kiel membro de la Hebei-provinca Filio de la Ĉina Verkista Asocio kaj tiu de la Hebei-provinca Filio de la Ĉina Muzikista Asocio.

La eldonaĵoj "Poezia Kolekto de Ĉinaj Poetoj", "Poezia Kolekto en la Okdekaj Jaroj" kaj "Poemoj de la Nunaj Mezlernejaninoj" ĉiuj enhavas ŝiajn poemojn. Koncernaj societoj de Usono, la antaŭa Sovetunio, Japanio, Jugoslavio k.a. konigis ŝin kaj ŝiajn verkaĵojn al siaj popoloj.

Sub semaforo

Teksto kaj fotoj de WU XINHUA


Krom gravaj okazaĵoj en- kaj eksterlandaj, prezoj kaj TV-filmoj en serio, la pekinanoj plej zorgas pri trafikado en la urbo. Milionoj da bicikloj kaj aŭtoj kuradas en la urbo kaj sub la direktado de semaforoj kaj policanoj, la urbanoj iras al laboro, bazaro kaj aliaj lokoj. Pro la reformado kaj pordomalfermo, la trafikado jam ne povas konformi al la novaj cirkonstancoj. La Buroo de Publikaj Vorkoj de Pekino multe larĝigas kaj konstruas novajn stratojn, sed la urbanoj ankoraŭ plendas kontraŭ strata obstrukco. En tiaj situacioj semaforoj kaj policanoj ludas tre gravan rolon. Rilate policanojn, la urbanoj kaj ŝatas kaj malŝatas ilin. Oni plendas, ke la policanoj estas ĉikanemaj al la vojirantoj kaj tro senindulgaj al la ŝoforoj, kiuj malobservis la trafikan regularon. Sed kiam la stratoj estas obstrukcitaj en pinthoroj, oni deziregas, ke venos centoj da policanoj por solvi la obstrukcon. Kaj ili multe dankas la policanojn, kiam ĉi tiuj helpis ilin en solvo de paneo aŭ vojperdo. Iu ŝoforo korverŝis al mi: "Mi certe maltrankviliĝos, se mi ne renkontos policanon dum tuttaga veturigado, timante akcidenton. Kiu juĝos por mi, se min trafos trafika akcidento?" Li diris prave. Plendo kontraŭ kaj danko al policanoj estas tute naturaj. Jen la vivo de la homoj. Fininte sian deĵoron kaj surhavante civilan veston, la policanoj frontas aktualajn detalaĵojn de la ĉiutaga vivo: Ankaŭ ili devas iri aĉeti manĝaĵojn,


zorgi pri siaj familianoj, pri la loĝejo k.a. Ili klopodas, ili plendas, same kiel aliaj urbanoj. Ili iras frumatene al deĵoro, revenas malfrue en vespero, ili ne havas tempon por televidi ŝatatajn programerojn. Ili devas helpi siajn infanojn en plenumo de hejmtasko. Iliaj edzinoj estas ŝarĝitaj per peza dommastrumado, sed ili ne havas tempon por helpi ilin. Se vi interparolos kun ili, ili certe diros: "Ha, ĉiuj havas sian agrablaĵon kaj ankaŭ aflikton, sed neniu intencas kaŭzi al aliaj malagrablaĵoj. Ni ja estas samurbanoj. Sed nun, la urbanoj ne bone konscias la streĉitecon de la trafikado, kaj ni devas multe labori por admoni ilin al observo de la trafika regularo. Kian malĝojon oni devos suferi, se okazos serioza trafika akcidento. Semaforo estas direktanto de trafikado, sed multaj neglektas ĝin. Pli kaj pli intensiĝas la trafikado en Pekino, kaj ofte semaforoj ne povas ludi sian rolon faciligi la trafikadon, tiam ni devas direkti trafikadon meze de stratoj."

Multaj el la trafikaj policanoj estis diplomitaj el policlernejo. Ili ne nur zorgas pri trafikado, sed ankaŭ prezentas al la magistrato konsilojn pri glatigado de trafikado. La magistrato de Pekino jam komencis konstrui plurajn aŭtovojojajn trefkruĉiĝojn sur la dua ĉirkaŭurba strato, la trafika aorto de Pekino, por faciligi la trafikadon en Pekino.

Kun disvolviĝo de la urba konstruado, pli kaj pli malmultiĝos la semaforoj en Pekino, kaj multe pliboniĝos la kondiĉoj de la laboro de la policanoj. Tamen certa nombro da semaforoj postrestos kaj daŭre funkcios, ĉar grandskala portrafika konstruado povus detrui la aspekton de la antikva urbo.

Volontulo por trafiko-sekureco





Vigla trafiko ĉe vojkruciĝo




Helpo al vojperdintoj



Bona ordo sub semaforo

Senkompata puno al malobservinto de trafika regularo



Kanto kaj danco de nordorienta Ĉinio

Teksto de CHEN SI

Fotoj de CAI HAIFENG

ANTAŬ nelonge la Shenyang-a Kantomadanca Ensemblo prezentis sur la pekina scenejo kantodancon “Sub Lunarko”, kiu spegulas popolajn morojn en nordorienta Ĉinio. Kiel varma vino, la prezentado ebrigiis la spektantojn. Eble pro la granda konateco, la popolkantato “Sub Lunarko” en nordorienta Ĉinio, cirkulanta multajn jarojn, surprizis la spektantojn, kiam ĝi montriĝis en nova formo sur la scenejo.

Je la mencio de la Nordoriento de Ĉinio, la imago de ĉinoj facile glitas al la impreso pri neĝa mondo kaj senlima fekunda nigra tero. Tie ne estas delikata pejzaĝo kun pontetoj kaj riveretoj ofte vidataj en suda Ĉinio. Tamen la vastega ebenaĵo, majestaj montoj kaj riveroj, kiel skiza fresko, kreis la apartan temperamenton de nordorientanoj: la viroj estas vastanimaj kaj honestaj; kaj virinoj kuraĝaj kaj duretaj. La danco “Sub Lunarko” krokizas per arta lingvo serion da pentraĵoj pri nordorientaj moroj.

La vivo, kiel muziko, konsistas el diversaj movimentoj de naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo, morto, feliĉo kaj malfeliĉo. La aŭtoro manifestas procezon de la vivo de la

nordorientanoj per kvin memstaraj kaj ankaŭ interligitaj partoj. La enamiĝo estas kaj marko de maturiĝo de la vivo kaj starta punkto de nova vivo. Malheliĝis. La malleviĝanta suno siluetigas la objektojn sur la tero. Ĉe malhelblue lumanta rivereto geknaboj kun vekiganta amo honteme kolombumas kaj malfermas unu al la alia la pordon de la koro. Jen estas la unua sceno — Amo ĉe Noktiĝo.

Ĝuste kiam la geamantoj dronis en ekstazo, ilin konsternis grupo da gajaj kamparaninoj de la vilaĝo. Kiel surprizitaj ambirdoj, la geamantoj disiĝis kaj sin kaŝis. La kamparaninoj amuziĝas kaj ŝercas verŝante akvon unu al alia. Jen aperas sur la scenejo alia bildo pri banado de nordorientaj kamparaninoj.

Parolante pri tiu ĉi akto, scenaristo kaj reĝisoro Li Shaodong diris: “Ni nordorientanoj famas pro niaj vicleco kaj sincereco. Do, kiel tion esprimi? Mi inspirois el la kampara vivo dum mia infaneco. Mi memoras ankoraŭ, ke en someraj vesperoj, kamparaninoj de mia vilaĝo kolektiĝis kun lavtukoj ĉe la rivereto apud la vilaĝo. Ili forlavis per la klara riverakvo polvon kaj laciĝon. Ilia ŝerca ridado ĉiam restas tiel klara kaj gaja en mia cerbo. Ĝuste pro tio, kiam mi skribis tiun

ĉi akton, mi preskaŭ sensange surscenigis la vivon. Ĉu la metodo estas bona aŭ malbona, tamen ĝi surscenigas la veran vivon.”

Leviĝas la luno. Aperas sur la scenejo du kortuŝaj bildoj: en ĉambro Blinda Mangmei palpe lumigas olelampon, kiun ŝi ne povas vidi tamen povas senti per la koro. Ekster la domo regas glacio kaj neĝo. Ŝia amato Hange urĝas la ĉevalĉaron krakigante longan vipon. La galopado de la ĉevalo ekscitas ŝin. La amato finfine alvenas ĉe ŝin. Ŝi, per la koro pli klara ol la okuloj observadas sian longe sopirantan amaton kaj kantas per sia koro pli kortuŝe ol per la voĉo: “Mi estu varma vino vin varmiganta; mi estu kandelo vin lumanta.” La spektantojn kaptas plena silento. En ilia koro la glacio kaj neĝo sur la scenejo jam degelas pro ilia arda amo, kaj tuj poste eksplodas manklakado ĉe la spektantoj.

Alia bildo kontrastas kun tio: Lunarko lumigas tra la fenestro solecan fraŭlon. Profunda dormo ŝanĝas liajn solecon kaj aflikton en belan sonĝon. En la nuba ĉielo lin ĉirkaŭas feinoj. Unu el ili flugas al li sur blanka nubofloko. Li volas kapti ŝiajn manojn; sed ŝi ŝvebas kiel nubo aŭ ĉe li aŭ for de li. Kaj kiam li kaptas ŝin, ŝi montriĝas turpa. Post petego li fine konkeris

ŝin. Sed post vekigo li falis en pli amaran aflikton. Larmoj rebrilas en pala lunlumo.

La rolojn de Mangmei kaj fraŭlo ludas geaktoroj Chen Li kaj Liu Xingjiu de la kantodanca ensemblo. La aktorino diris al mi, ke la figuro de blinda Mangmei estas la plej ŝatata en ŝia aktorina vivo de pli ol dek jaroj. Figuro de blindulo malofte aperas en danco. Estas malfacile ludi la rolon. Sed la scenaristo kaj reĝisoro donis al tiu ĉi rolo abundan enhavon, tial ŝia "blindeco" ne malhelpas la ludadon de la aktorino, kiu tamen pli energie klopodis por prezenti la internan mondon en la koro de la rolo. Ŝi diris: "Ĝuste pro ŝia blindeco la mondo estas aparte ĉarma por ŝi kaj ŝia amo al Hange estas plej profunda kaj pura." Kaj Chen Li ja realigis tion sur la scenejo. En la okuloj de la spektantoj la rolo ja enkorpigas "puran amon".

S-ro Liu Xingjiu aĝas jam pli ol 40 jarojn, ne tiom taŭge por danco. Sed li ankoraŭ aktivadas sur scenejo. La fraŭlo devas fari mul-

tajn saltojn kaj transkapiĝojn. Tio ne estas tre facila eĉ por junuloj. Post la scenejo mi rimarkis, ke li kurbiĝis pro laciĝo kaj ŝvito riveris sur lia vizaĝo. Mi informiĝis, ke li prezentis la dancon malgraŭ korpa vundiĝo.

Noktomezo estas finiĝo de tago kaj ankaŭ komenciĝo de nova tago. La scenaristo rimarkigis, ke nasko en la danco okazis ĝuste ĉe noktomezo. Tio havas simbolan signifon. Sur la scenejo rubando el blanka ŝtofo kun ruĝa kruco ŝirmas la supran korpon de la aktoroj kaj videblas nur iliaj kruroj. Inter ili iuj hezitas, aliaj hastas, triaj malvigle staras, kvaraj saltetas senpacience. La sceno vivece spegulas la animstaton de la viroj, kiuj atendas ekster la akuŝĉambro senpacience dezirante fariĝi patro. La unua ploro de novnaskito alportas ĝojon. Naskiĝis nova vivo. La patroj donacas al la beboj tigroforman ĉapon kaj kolĉenon kun seruro (simbolo de longviveco). La novaj patroj dancas kaj kantas benan kanton por la nova vivo.

En la koncepto de ĉinoj feliĉa fino ĉiam estas la ĉefa melodio de la vivo, malgraŭ tio, ĉu la vivo estas plena de sufero kaj vagado. La lasta sceno de la danco rakontas enamiĝon de paro da gemaljunuloj. La geamantoj, kiuj ne povis geedziĝi en sia juneco, renkontiĝis denove en sia maljuneco kaj geedziĝis.



La scenaristo tiel eksplikis sian motivon de verkado: "Lunarko, blindeco kaj fraŭleco ĉiuj ne estas perfektaj, sed la vivo ja estas procezo de neperfekteco al perfekteco. La feliĉo kaj malfeliĉo dum la vivo estas la plej emociaj. La tuta danco celas esprimi sentojn kaj morojn en la vivo de la nordorientanoj."

"Sub Lunarko" kaj la novaj kantodancoj "Amo de Gefiloj de Flava Rivero" kaj "Amo al Hejmvilaĝo" temas pri moroj kaj amo. Plenaj de densa loka gusto ili prezentas lokan fizionomion, esprimas la strebadon de ĉinaj naciaj dancoj sur nova kultura nivelo kaj estas bona komenco de progreso de la ĉina danca arto. ■


Amo de gemaljunuloj




Beno al nove naskitaj beboj



Sub lunarko



Fraŭlo sonĝas pri edziĝo.



Blinda junulino kaj stultulo

Gejunuloj ĉe rivereto



EKONOMIO

● Ĉinio dediĉas plenan atenton al pluapaŝa plibonigo de eksporta kaj importa administra sistemo, por ke la administrado konformu kaj al la aktualaj kondiĉoj de Ĉinio kaj al la internacia situacio. Ĉinio aranĝas importon laŭ la principo "fundamenta ekvilibro inter eksporto kaj import", kondiĉe ke ĝi havas necesan rezervon de fremda valuto. Ĝis 1995 la totala sumo de import de Ĉinio superos 300 miliardojn da usonaj dolaroj.

● En la lastaj 20 jaroj 89 bonaj specioj de altebenaĵaj agrikulturaj vegetaloj, kiel hordeo,



Tibetaj kamparanoj ŝprucigas insekticidon al tritikaj kampo

tritiko, pizo kaj kapsiko, en la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio trapasis ekspertizon kaj disvastigis, kaj tiel akcelis la disvolvigon de grenaj kaj legoma produktado de la regiono. Ĝis la fino de 1991 la regiono efektivigis fundamentan aŭtarcon je greno kaj legomoj.

● Ikawa Konfida kaj Investa Grupo de Japanio kaj la Gvidantaro de Loka Fervojo de Fujian-provinco de Ĉinio subskribis antaŭ nelonge en Fuzhou kontrakton pri kuna konstruo de trunka fervojlinio inter Fuzhou kaj Xiamen, la unua ekspresa fervojo en Ĉinio.

La fervojo kun investo de 0.8 miliardo da usonaj dolaroj longos je 250-280 km kaj havos 4-6 staciojn. La tuta veturado bezonos 1-1.5 horojn.

● En la Internacia Foiro de Brandoj kaj Vinoj okazigita ĉi-jare en Nov-Jorko, Usono, eksponiĝis pli ol 5 000 specoj da vinoj de 400 kompanioj (fabrikaj) el 17 landoj, inkluzive de Ĉinio, Britio, Usono, Francio kaj Japanio. La brandoj Maotai, Wuliangye, Wuling, Gujing, Yanghe kaj Meijiao

de Ĉinio gajnis 6 orajn medalojn, kaj Deshan-brando gajnis arĝentan medalon de la foiro.

MEDICINO

● Ĉinio faris grandskalan eksperimentadon kaj esploron pri kanceraj ezofaga, hepata, stomaka, intesta, rinofaringa, utercervika k.a. en la lokoj, kie la morbokvanta ento de tumoro estas alta, kaj akiris bonajn sukcesojn.

Jam daŭris 20 jarojn en Ĉinio esplorado pri preventado kaj kuracado de tumoroj en tiuj lokoj, kie la morbokvanta ento de tumoro estas alta. Farinte enketadon kaj analizon pri pli ol 40 tumorpreventaj kaj -kuracaj punktoj de 16 lokoj de la lando, kie estas multaj suferantoj de tumoroj, oni bone plenumis 122 ŝlosilajn temojn pri preventado kaj esplorado pri tumoroj. Ekz. aplikante kancerigan nitrozoaminon trovitan en Linxian-gubernio, Henan-provinco, kie multaj homoj suferas de ezofaga tumoro, oni sukcese estigis al homa feti ezofagan epiderman skvaman kanceron. Tio estas la unua fojo en la mondo doni rektan sciencan bazon pri patogenio de ezofaga kancero pro nitrozoamino, kaj tiel la preventaj rimedoj kontraŭ ezofaga kancero povas esti pli efikaj.

● Pro akuta intesta obstrukco en februaro 1986, 33-jara virino Zhou Qisi en Ŝanhajo estis operaciita je fortranĉo de la tuta nekrozita maldika intesto. De tiam ŝi estas vivtenata per intravejna pogutigado de artefarita nutrolikvaĵo.

Antaŭ nelonge Zhongshan-hospitalo de Ŝanhajo faris al ŝi, graveda de 36 semajnoj, cezaran operacion, kaj ŝi sekure naskis ineksan bebon.

Zhou Qisi (la dua de maldekstre)



- Fondiĝis lastatempe hospitalo por mortontoj en la okcidenta antaŭurbo de Pekino. Ĝi estas la unua tia hospitalo en Pekino. La hospitalo prizorgas mortontojn per kuracado, flegado kaj psika konsolo, por ke maljunaj malsanuloj ricevu konsolon kaj prizorgon. La hospitalo kuracas tumorojn de meza aŭ lasta stadio, kardiovaskulan kaj cerbovaskulan malsanojn, renan malsanon kaj aliajn malsanojn de maljunuloj ĉefe per sinteza terapio de tradicia ĉina medicino, okcidenta medicino kaj ĉigong-o.

- Weng Xiaoxian, kuracisto de Bankoko, Tajlando, venis julie de 1991 al la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo, fama en kaj ekster la lando pro sukcesa rekunigo de rompitaj membroj, por sin trejni. Reveninte al sia lando, en du semajnoj li rekunigis du rompitaĵajn fingrojn per la nove lernita mikroskopa kirurgio, unu kaj duono de la fingroj reviviĝis.

Statistiko raportas, ke tiu hospitalo jam akceptis 20 kuracistojn el 15 landoj inkluzive de Usono, Germanio, Italio kaj Meksikio, kiuj venis por lerni rekunigon de rompitaĵaj membroj kaj mikroskopan kirurgion.

TURISMO

- 1992 estas jaro de turismo en Ĉinio. La Pekina Turisma Buroo elpensis "turisman paspor-ton". Ĉiuj turistoj ĉinaj kaj eksterlandaj povas ricevi ĝin ĉe 30 famaj pitoreskejoj kaj historiaj vidindejoj, ekzemple la Imperiestra Palaco, la Somera Palaco, la Ĉiela Altaro, la Dek Tri Maŭzoleoj kaj la Granda Muro. Ĉe ĉiu el tiuj lokoj la turistoj ricevas stampon sur sia pasporto. Tiuj stampoj en malsamaj grandoj kaj formoj estas tre belaj.

- Ĉe Huangguoshu en Guizhou-provinco, la plej granda akvofalo en Ĉinio, baldaŭ finiĝos por ĉiam seka sezono.

Nun 2.5 km. supre de la akvofalo estas konstruata akvokonservejo kun 19.5-metra baraĵo kaj kapacito de 1.5 milionoj da kubmetroj da akvo. Ĝi plenumiĝos antaŭ komenciĝo de la seka sezono, ĉi-jare. Ĝi reguligos la flukvanton de la falakvo por teni la imponecon de la falakvo en la seka sezono.

SCIENCO

- Ĉinaj kaj germanaj sciencistoj sukcesis en esplorado de sunenergia utiligo farita en malalta-latituda regiono. Ili konstruis la unuan sundomon en Ŝanhajo. Post unujara pruvo la teknikaj datenoj superis la projektitajn normojn.

La sundomo kun areo de 1 000 kvadrataj metroj estis konstruita laŭ la ordinaraj normoj de apartamento el du ĉambroj kaj unu vestiblo. Ĝiaj



La Pekina Turisma Buroo organizis diversajn aktivadojn por la Turisma Jaro 1992. La foto montras la muzikan kaj dancan prezentadon por kulto de Konfuceo.

eksteraj muroj estis instalitaj per ordinara plata vitro kaj reguligeblaj persienoj en ŝtala kadro kaj ligna framo. Krome aldoniĝis travidebla varmizola materialo dika je 3 cm. Mezurado montris, ke en vintro la temperaturo en la sundomo estis pli alta je 5-6°C ol tiu en ordinara domo, kaj en somero malpli alta je 3-4°C.

KULTURO

E Muzeo de Vakstinktura Kulturo, ununura en Ĉinio, konstruiĝis kaj oficiale malfermiĝis en la urbo Anshun, Guizhou-provinco, naskiĝloko de vakstinktura arto.

La muzeo konsistas el tri eksponejoj. La unua detale konigas proceson de vakstinktura. La dua montras ĉ. 500 valorajn antikvajn kaj modernajn vakstinkturaĵojn. La lasta konigas disvastiĝon de la vakstinktura de Guizhou en la mondo.



La ruino de fuorto sur Zongshan-monto

Foto de LI QIANG

Vojaĝo al Gyaze

Teksto de LI QIANG

Baiju-pagodo

Foto de LI QIANG



Laborejo de la tapiŝa fabriko

Foto de LIU WENMIN



EN la supra baseno de la rivero Yarlung Zangbo norde de Himalaya-montaro sur la Tibeta Altebenaĵo kuŝas vasta tero kun areo de pli ol 300 000 kvadrataj kilometroj. Oni kutime nomas ĝin Malantaŭa Tibeto.

Per aŭto mi veturis al Gyaze, grava urbo de tiu regiono. La urbo situas ĉe la rivero Nianchu. Tie la temperaturo estas alta, pluvo abunda kaj produktaĵoj riĉaj. Ĝi estas grava grena produktaĵo de Tibeto.

La plej rimarkindaj en Gyaze estas Zongshan-monto kaj alte staranta fuorto sur la monto. Sur la supro de Zongshan mi trovis, ke la antaŭaj domoj jam falis kaj la antikva fuorto ruiniĝis. Tamen la ruino markas la heroan pasintecon de la loko.

En la fino de la 19-a jc., kiam la britaj imperiistoj agesis la sudorientan marbordon de Ĉinio, ili sin enrudis ankaŭ en Tibeton. En 1888 la tibeta popolo faris la unuan kontraŭbritan batalon. En 1904 la britaj imperiistoj duafoje invadis Tibeton kaj okupis Gyaze. Ĉie la agresantoj mortigis kaj bruligis. Dalailamao la 13-a alvokis, ke la popolo sin armu por batali kontraŭ la malamikoj. La militistoj kaj civitanoj kune batalis kaj peze batis la agresantojn kaj reakiris la urbon kaj fuorton.

En junio 1904 Britio sendis helpotrupon por sieĝi Zongshan-monton. La armeanoj kaj popolanoj de Gyaze defendis la pozicion per blunderbuzoj, glavoj kaj ŝtonoj kaj faris ĝismortan batalon 3 tagnoktojn kaj fine la batalantoj plejparte mortis. La brava batalo de la Gyaze-a popolo montris, kiel brave batalis la tibetanoj por la nacia digno kaj teritoria integreco spite martiriĝon. Hodiaŭ la monto Zongshan kiel giganta monumento staras en Gyaze kaj montras la heroecon kaj patriotismon de la Gyaze-anoj. Ĝi estas fiero de la loĝantoj.

Malsuprenirinte de Zongshan-monto kaj ĉirkaŭirinte ĝin, ni atingis la templon Baiju. Ĝi estas fama pro sia grandeco kaj granda nombro de la bonzoj. En ĝi estas pluraj lamaismaj sektoj. Pro tio ĝi estas grava en la historio de lamaismo. Ĝi ankaŭ altiras artistojn kaj turistojn ĉinajn kaj alilandajn per sia originala arkitektura stilo, belaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj.

En la templo estas entute 16 haloj, inter kiuj la ĉefa halo estas 3-etaĝa kun sida budhostatuo 8 metrojn alta el kupro. Sur la tablo antaŭ la statuo estas delikataj buterfloroj, kiuj estas valoraj artaĵoj. Kiam ni suriris la tegmentan terason en la tagmezo, juna lamao batis sonorilon. La blua ĉielo, blankaj nuboj, oraj tegmentaj ornamaĵoj, lamaoj en flava ĉapo kaj purpura stolo, bela sonorado... Ĉio ĉi min ravis, ke mi sentis min kvazaŭ en paradizo.

Baiju-pagodo apud la templo estas fama tra la mondo. La 9-etaĝa pagodo estas 32 metrojn alta. De la unua ĝis la kvina etaĝo ĝi estas kvar-edra kaj ok-angula, de la sesa ĝis la naŭa etaĝo ĝi estas ronda. Interne de ĝi estas 77 budhaj haloj, sutraj haloj kaj niĉoj. Ĝi havas entute 108 pordojn kun delikataj

reliefaj de flugantaj drakoj, kurantaj leonoj, promenantaj elefantoj kaj aliaj. Laŭdire en ĝi estas 100 000 budhostatuoj, tial ĝi estas nomata ankaŭ Pagodo de Centmil Budhostatuoj.

Rigardinte la historiajn restaĵojn, mi vizitis la Gyaze-an Fabrikon de Tapiŝoj. En Gyaze oni komecis teksi lanan tapiŝon jam antaŭ 600 jaroj kaj oni nomas ĝin hejmloko de tibetaj tapiŝoj.

La fabrikestro estas tibetano. Montrante la mur-tapiŝon pendantan en la akceptejo, li diris al mi, ke la tapiŝoj estas kaj objektoj necesaj por la ordinara vivo de la tibetanoj kaj tradiciaj naciaj metiartaĵoj. Ili estas tre ŝatataj en- kaj eksterlande pro sia alta valoro por ĝuo kaj konservo.

En laborejoj mi rigardis, kiel laboristoj kombilas, ŝpinas kaj tinkturas ŝaflanon, kaj teksas kaj pritondas tapiŝojn. Dum mia vizito la fabrikestro rakontis al mi la historion de la fabriko. Antaŭe ĝi estis produkta kooperativo organizita de veteranaj metiartistoj en 1973. Post la proksimume 20-jara disvolviĝo ĝi havas domojn kun areo de 4 500 kvadrataj metroj, kie laboras 230 laboristoj. Ĉar ili laboras ĉefe per tradicia metiarto, tial la produktaĵoj elspiras tipajn naciajn trajtojn. Ili estas tre ŝatataj en la internacia merkato. En la lastaj jaroj komercistoj el Usono, Britio, Germanio, Kanado, Svisio, Aŭstrio kaj aliaj landoj venis unu post alia en Gyaze por aĉeti diversspecajn tapiŝojn.

En la hejmoj de multaj kamparanoj en Gyaze estas teksilo. La virinoj komencas teksi tapiŝon jam en sia infaneco. En bazaroj oni pendigas siajn tapiŝojn en okulfrapaj lokoj. La belaj tapiŝoj ĉiam vekas admiron al la tapiŝofarantaj knabinoj. ■

ABONTARIFO DE EPĈ

lando	Valuto	1 jaro
Aŭstralio	AUD	33.00
Aŭstrio	ATS	320.00
Belgio	BEF	936.00
Germanio	DEM	45.50
Britio	GBP	15.50
Finnlando	FIM	111.00
Francio	FRF	150.00
Italio	ITL	34000
Japanio	JPY	3600
Nederlando	NLG	51.00
Nov-Zelando	NZD	45.00
Svisio	CHF	39.50
Usono	USD	26.00
Kanado	CAD	30.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:	USD	26.00
-----------------------------	-----	-------

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:	USD	9.50
---	-----	------

BOKE-O estas luktarto populara inter la mongoloj, kun longa historio. En la okuloj de la loĝantoj sur la mongola stepo, Boke-o estas ne nur konkurso de forto, sed ankaŭ tiu de arto kaj saĝo de la luktistoj.

Oni diras, ke en 1206, por festi sian surtroniĝon, la fondinto de la Mongola Imperio Ĝingis-Ĥano okazigis solenan kunvenon sur la stepo: Konkursis 1 024 lertaj luktistoj.

Post 785 jaroj, t.e. en 1991, sur la stepo de la Interna Mongolio refoje aperis tia spektaklo: En la Sepa Nadam-foiro la nombro de la luktistoj estis ĝuste 1 024.

Boke-o, kiu ekfuroris en la 13 jc., neniam malprosperis. La disvolviĝo de la nacia sporto plivigligas ĝin.

Boke-o, signifanta pene-man luktadon, fortikecon, persistemon kaj superemon, elspiras fortajn naciajn trajtojn. Ĝi distingiĝas per sia populareco kaj konkurseco.

Oni diras, ke mongolaj knaboj kreskas surĉevale. Sed koncerne la tieajn knabojn, oni povas diri, ke ili kreskas ankaŭ sur luktejo. Ekde la aĝo de 5-6 jaroj la knabetoj, imitante siajn patrojn kaj pliaĝajn fratojn, luktadas serioze kun siaj kamaradetoj. Junuliĝinte ili elmontras sian talenton en Nadam-foiro.

En la element- kaj mezlernejoj sur la stepo estas instruata arto de Boke-o. Tie ĉiujare okazas Boke-a konkurso por element- kaj mezlerneĵanoj, viroj kaj virinoj. En Nadam-foiro okazinta en 1991, krom 1 024 partoprenantoj de vira konkurso, konkursis ankaŭ 128 virinoj kaj 256 knaboj.

ZHANG QINGZHEN:

Boke-o en disvolviĝo



Boke-konkurso sur stepo

En la konkurso de Boke-o ĉiuj partoprenantoj ĝuas egalan rajton sen distingo de iliaj aĝo, socia pozicio, nacio kaj loĝado. Laŭdire iam estis la historio: Foje sur la stepo estis konkurso de Boke-o. Iu almozulo sin anoncis partopreni en ĝi. Lia rivalo estis neniu alia ol luktisto de aristokrato, kaj ĉi tiu

neniel volis konkursi kun li pro malestimo. Laŭ regulo oni deklaris, ke la almozulo gajnis la konkurson.

Ĉiuj junuloj de la stepo estas kapablaj en luktado. Kiam la paŝtistoj festas riĉan rikolton kaj geedziĝon, kultas siajn prapatrojn kaj religie petas pluvon de la ĉielo kaj eĉ kiam iliaj gefiloj sukcesis en la enira ekzameno por alta lernejo, ili okazigas Boke-an konkurson. Ne mankas tie familioj, en kiuj la patro kaj filoj estas lertaj luktistoj.

La patro de lerta luktisto Erdeng Bayar estas fama luktisto tra la tuta stepo. Li donis al sia filo la kolrington, simbolon de la honoro de luktisto kaj de la venko en diversspecaj Nadam-foiroj. Sur la kolringo pendas ĉ. 300 buntaj silkkrubandoj. Rigardate de malproksime, Erdeng Bayar kun la kolringo aspektas kiel brava leono kun densaj kolharoj.

En sia 7-8-jara aĝo Erdeng Bayar ekzercis sin per luktado. Pli-ol-dekjara, li membriĝis al la Luktista Teamo de la Interna Mongolio. Li partoprenis 150-foje en grandaj konkursoj. Li diris: "Pro mia aĝo mi devas doni la kolrington al mia filo, ĉar junuloj multe pli promesas ol mi."

Sur luktejo ĉiam regas granda spektaklo. Belaj estas la vestoj de luktistoj: Sur ledvestoj brilas argentaj aŭ latunaj butonoj; sur la lozaj drelikaj pantalonoj vidiĝas diversspecaj bele broditaj bildoj. Portante tiajn vestojn

kaj ledbotojn la luktistoj aspektas pli viglaj.

La tradicia Boke-o malsimilas al aliaj luktoj en tio, ke en ĝi estas nur solludo sen tempolimigo kaj distingo de korpopezo de la sportistoj, kaj plie unufoja lukto decidas la venkon kaj perdon. Ĉi-flanke

krom supereco, ĝi havas ankaŭ sian mankon, nome, estas malfacile popularigi ĝin kiel modernan sportobranĉon, ĉar oni perdas la ŝancon partopreni en la tuta konkurso, se li malsukcesas en la unuafoja konkurso. Tio estas malutila al junaj debutintoj. La nelmigo de tempo rezultigas eble, ke paro da samnivelaj rivaloj daŭrigas la lukton pli ol 10 horojn, kio enuigas la rigardantojn.

Por solvi la supre menciitajn problemojn laŭ la nova regularo Boke-o ekhavis teaman, konsolan kaj prezentan konkursojn. Por la teama konkurso oni praktikas la alternan konkurson kadre de du triopoj. La partoprenantoj luktas ne nur per kuraĝo sed ankaŭ per saĝo. La favorata flanko de la konkurso estas decidita per lotado. La juĝanto havas la rajton definitive decidi la vicon de luktistoj en la konkurso. La konkurso konsistas

el naŭ matĉoj. Kiu gajnos kvin matĉojn, tiu estos venkinto. Por levi la nivelon de konkurso, oni instalas fortajn luktistojn por individua konkurso.

La diverseco de konkursoj kaj reformo de la regularo multe akcelis la disvolviĝon de Boke-o. En 1986 Boke-o fariĝis oficiala konkursa sporto de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. En 1988, oni sukcese prezentis Boke-on en la Ĉina Kampana Sportkunveno. En 1991 Boke-o estis enlistigita kiel oficiala sporto en la Kvara Tutlanda Tradicia Sportkunveno de Ĉinaj Naciminoritatoj. Tio markis, ke Boke-o disvolviĝas ne nur sur la stepo, sed ankaŭ en aliaj lokoj de Ĉinio.

El la vidpunkto pri disvolviĝo de la modernaj sportoj estas du specoj da sportobranĉoj, kiuj povas evolui tra la tuta mondo. Unu estas sporto kombinanta altan teknikon

kun fizika kapablo de la homoj, kaj la alia — sporto kombinanta naciajn trajtojn kun konscio de nuntempa konkurso. La originaleco de Boke-o estas ĝuste en tio, ke ĝi donas senton de krizo kaj intensan konscion de konkurso, kaj cetere, la kapablon tuj kapti la ŝancon venki la rivalon.

Iu uson-devena sporta profesoro de Osaka Universitato, Japanio opinias, ke Boke-o probable fariĝos bazo de luktarto. Ĝiaj supre menciitaj mankoj ŝajne malobservas la principon de konkurso en la moderna sporto, sed fakte ili montras ĝuste ĝian plej grandan superecon. Lia opinio estis pruvita en la Sesa Tutlanda Sportkunveno okazinta en Kantono en 1986: Tiam la Sporta Delegacio de Interna Mongolio gajnis sume 14 orajn medalojn, naŭ el kiuj estis gajnitaj de luktistoj praktikantaj Boke-on. ■

Kara amiko,

Memore al la 45-a datreveno de sia fondiĝo, Radio Pekino okazigas Konkurson pri Historiaj Scioj de Ĉinio, de majo ĝis septembro ĉi-jare.

Sume ok demandoj:

1. Kiu speco de prahomoj vivis en Pekino antaŭ 500 000 jaroj?
2. Kiu pensulo kaj edukisto naskiĝis en la jaro 551 antaŭ nia erao? Kian titolon portas la libro de liaj vortoj, kolektitaj de liaj disĉiploj?
3. Kiu strategiisto en la kvina jarcento antaŭ nia erao verkis libron pri militarto? Kaj ĝia titolo?
4. Kiu fariĝis la unua imperiestro de Ĉinio? Kion valoran oni poste eltrovis el lia maŭzoleo?
5. Ĉu vi povas citi la kvar inventaĵojn kaj ankaŭ iujn aliajn el la antikveco de Ĉinio?
6. Kiu du urboj, ĉina kaj itala, estis la ekstremoj de la Silka Vojo? Kiujn landojn kaj regionojn ĝi trairis?

7. Kiu italo venis al Ĉinio kaj restis 15 jarojn en la 13-a jarcento? Kiun libron li verkis?

8. Kiu estas la plej renoma operspeco de Ĉinio? Kiom da jaroj ĝi havas?

Ĉiu partoprenanto fine ricevos premion aŭ memoraĵon.

Por faciligi al vi la respondon, ni disaŭdigas kvin artikolojn ekde la 14-a de majo, en la programero Ĉina Kulturo, kaj ilin ripetos en la 20-a de aŭgusto.

Bonvolu partopreni en la konkurso kaj sendi vian respondon al Esperanto-Sekcio de Radio Pekino. La limdato estos la 30-a de septembro. Ni deziras al vi plenan sukceson.

**Esperanto-Sekcio de
Radio Pekino
Beijing 100866
Ĉinio**

Mi ŝatas la profesion de ĉiĉerono

KIAM mi finis studadon en universitato en 1982, mi elektis la profesion de ĉiĉerono. Tiam mi tute ne imagis, ke post kelkaj jaroj la profesio fariĝos unu el la plej ŝatataj kaj enviindaj profesioj en Ĉinio. Mi faris la elekton ĉar mi ŝatas la profesion.

Mi laboras tutforte. Dum la dek jaroj mi akceptis milojn kaj milojn da turistoj kaj iris longajn vojojn. Mi povas diri, ke mi jam rigardis ĉiujn famajn pitoreskejojn kaj antikvajn restaĵojn de Ĉinio kaj lasis miajn spurojn ĉe ĉiuj famaj montoj kaj riveroj de la lando. Mi ŝatas kulturajn restaĵojn, antikvajn templojn kaj steleojn kun kaligrafiaĵoj de la patrolando, volas amikiĝi kun diversaj personoj. Mia profesio liveras al mi la ŝancon por tion fari, tial mi ŝatas la profesion.

Eble ĝuste pro la sama kialo, multaj homoj envias la profesion de ĉiĉerono. Tamen nur post kiam oni vere profesias kiel ĉiĉerono, oni scias malfacilojn de la profesio. Per si mem turismo ja estas afero peniga, por ne paroli pri ĉiĉerono, kiu ne estas turisto, sed nur servanto al turistoj. Mi ekzemplu sole gvidon de karavano al la Granda Muro. Ĝi estas miraklo de la mondo kaj fiero de Ĉinio. Estas diro en Ĉinio: "Kiu ne atingis la Grandan Muron, ne estas bravulo." Preskaŭ ĉiuj turistoj venintaj al Ĉinio senescepte vizitas la Grandan Muron. Ĉiuj kiuj la unuan fojon surgrimpas ĝin elverŝas multajn sentojn kaj laŭdas ĝian imponecon. Tamen kion kortuŝan diru la ĉiĉerono, kiu surgrimpas ĝin sennombrajn fojojn jare, iam eĉ tri aŭ kvar fojojn semajne! Precipe en varma somero, kun la arda suno super la kapo, ĉiĉerono kuras jen antaŭen jen malantaŭen dum la ascendo por fari klarigon al turistoj, tiam li sentas nur ellaciĝon.

En aŭgusto lastjare mi gvidis turisman karavano al Tibeto. Mistera estas la loko, kiun piedtuŝis mi la unuan fojon post dekjara sopiro. Tamen altituda malsano forte dolorigis al mi la kapon, ke mi eĉ perdis la intereson pri ĝia mistero. Sed kiel ĉiĉeronino, mi devis gvidi la karavano dum vizito, telefone aranĝi programon posttagmezan en tagmeza ripozo, reguligi la konton kun hotelo kaj zorgi pri refluga bileto vespere kiam la karavano ripozis. Kiam mi kun peza kapo revenis al mia ĉambro, jam

estis profunda nokto.

En Ĉinio oni admiras la profesion de ĉiĉerono ofte pro miskompreno pri la laboro. Ekzemple, en iliaj okuloj ĉiĉerono povas vojaĝi al pitoreskejoj, libere iri en kaj el luksaj hoteloj kaj perlabori multe da mono. Tamen ili ne scias, ke ĉiĉerono devas perdi multon pro tio. Kiom longe ĉiĉerono povas resti hejme en unu jaro? Mi ne povas doni la ĝustan respondon. Ofte okazis al mi, ke adiaŭinte tiun karavano, mi tuj akceptis la alian post nur du tagoj. Hodiaŭ mi estis en la plej suda urbo de Ĉinio, kaj morgaŭ mi jam troviĝis en la norda ekstremo de Ĉinio. Ĝuste pro tio ĝis nun mi ne kuraĝas patriniĝi, kvankam mi edziniĝis jam antaŭ kelkaj jaroj. Feliĉe

Guan Li helpas maljunulinon.





Guan Li konigas al turistoj vidindaĵon.



Guan Li (la tria de maldekstre) kaj usonaj turistoj

mia edzo bone komprenas kaj subtenas min, ke mi ĝuis feliĉan familian vivon ĉiufoje kiam mi revenis hejmen.

Kvankam ĉiĉerono laboras penige kaj ofte estas maljuste traktata, tamen mi ankoraŭ ŝatas la profesion, ĉar ĝi lasis al mi multajn belajn memorojn. Precipe kiam gastoj aprobas mian laboron kaj rekompencas min per sincereco, mi sentas amikecon translandliman en la homa mondo.

Foje mi gvidis usonan turisman karavanon. En ĝi estis negraj patro kaj filo. La patro havis pli ol 70 jarojn kaj la filo paralizigis multajn jarojn. Liaj malsupraj membroj ne povis moviĝi, liaj buŝo kaj lango tordiĝis kaj lia intelekto anormalis. La estro de la karavano plendis pri li. Ankaŭ mi embarasiĝis kaj ne komprenis, kial tia malfacile movebla homo vojaĝas al Ĉinio de dekmiloj da kilometroj fore? En la sekvanta tago la karavano planis vojaĝi al la Imperiestra Palaco. Mi konsilis al ili ambaŭ resti en la aŭtobuso, tamen la patro neniel konsentis. Li diris: "La duan fojon mi venis al Ĉinio ĝuste por akompani mian filon rigardi ĝin." Trovinte neniun alian solvon, mi povis nur helpi lin elaŭtobusigi lian filon. Iom post iom mi simpatiis kun ili kaj estis kortuŝita, ke la maljunulo por akompani la handikapitan filon venis al Ĉinio malgraŭ longa distanco. Por ne malhelpi aliajn karavananojn en la vizito, mi faris al la postirintaj patro kaj filo klarigon, profitante la tempon kiam aliaj faris fotadon. Tiamaniere, sur rulseĝo la handikapulo suriris ĉiun ŝtupon de la palaco kaj vizitis ĉiujn vizitindajn lokojn. Ankaŭ la karavananoj kortuŝiĝis kaj plenforte helpis ilin. En adiaŭa vespera bankedo, la filo kun granda malfacilo tajpis sur elektrona montrilo per la angla lingvo "Ĉinio", "dankon". Tio ege surprizis min. Similajn vortojn mi

aŭdis sennombrajn fojojn, tamen ĉifoje la vorto "dankon" el la koro de handikapulo estis aparte valorega. Tiu senvoĉa vorto estis la plej multekosta rekompenco por miaj peno kaj dediĉo, kaj la vortoj "dankon" kaj "Ĉinio" sentigis al mi sanktecon de la ĉiĉerona laboro.

Profesianta kiel ĉiĉerono, same kiel farante aliajn laborojn, oni povas labori facilanime kaj ankaŭ penege. Ŝajne mi apartenas al la lasta speco. Ekzemple iun vintron mi gvidis karavanon al la Granda Muro. Neĝo kovris la vojon kaj ĉiuj turismaj aŭtobusoj reveturis bedaŭre. Ankaŭ mi povus revenigi la karavanon al hotelo. Tamen mi ne volis lasi ilin malesperaj. Sekve mi gvidis ilin al Mutianyu, alia parto de la Granda Muro. Post multa klopodo kaj petado, la laboristoj, kiuj jam finis sian laboron kaj pretis hejmeniri, denove funkciigis telferon kaj transportis la karavanon sur la Grandan Muron. Ĉe adiaŭo al la karavano, ili donacis al mi desegnon de la Granda Muro, kune faritan de ili, kun iliaj subskriboj.

Iufoje en la Interna Mongolio mi elektis turisman lokon malofte vizitatan, ke la turistoj pasigis neforgeseblan tagon. Vespere, sub la arĝenta luno alte pendanta en la nigra firmamento, mi rakontis al ili antikvajn muzikojn kaj poemojn prikantantajn la lunon. Reveninte al jurto por dormi, mi trovis, ke aroj kaj aroj da moskitoj jam la unuaj enloĝiĝis. Mi forpeladis la moskitojn kaj veadis ĉagrene. Mi povus ne gvidi la gastojn ĉi tien kaj ne babili kun ili pri la luno.

Kompreneble mi ne sentis bedaŭron pri tio. Miaj gastoj povas scii de mi pli multe pri Ĉinio kaj forporti de Ĉinio belajn memorojn, tio sufiĉas por mi. Penigo kaj lacigo ne gravas, ĉar mi ŝatas la profesion. ■

Prof. Gaston Waringhien restos

ĉiam ĉe ni

Nin surprizis la malĝojiga informo, ke la 20-an de decembro 1991 ĉesis bati la koro de prof. Gaston Waringhien.

Prof. Gaston Waringhien estas bone konata de la ĉina esperantistaro, kiel kunlaborinto en "Plena Vortaro de Esperanto", ĉefredaktoro de "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" kaj kunaŭtoro de "Plena Analiza Gramatiko de Esperanto". Jam en sia juneco li eklernis nian lingvon, poste li dediĉis multe da tempo kaj grandan energion al la Esperanta kulturo, aktivis en nia movado kaj kontribuis al la mondpaĉo. Kiel unu el la eminentaj esperantologoj kaj gramatikistoj, li povas meriti la nomon "senlaca semanto sur la kampoj de Esperantujo". Ni, ĉinaj



esperantistoj, ĉiam rigardas liajn monumentajn verkojn valora riĉaĵo kaj neniam forgesos, kion li alportis al ni. Ni konfesas, ke sen li ni vagadus en lingva labirinto kaj hezitus ĉe vojkruciĝo. Nian ĝisnunan sukceson en laboro, eĉ malgrandan, ni ŝuldas al lia saĝo, al lia talento.

La forpaso de prof. Gaston Waringhien estas granda perdo por la monda esperantistaro, tamen li postlasis trezorojn al ni kaj lia brila figuro vivos ĉiam en niaj koroj. Li restos ĉiam ĉe ni.

Prof. Gaston Waringhien ripozu en paco!

Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de "El Popola Ĉinio"

LI SHIJUN:

Kiel majstro longe li nin gvidos

— Funebre al Gaston Waringhien

(1901-1991)

*En la kvardekaj jaroj Esperanto
min varbis por servad' en vasta lando.
Por ĝuste fari frazojn, uzi vortojn,
per PG PV mi faradis sportojn;
de l' Parnasa Gvidlibro poetikon
mi lernis, lanĉis eĉ praktikon.
En ĉiu tago Waringhien min gvidis,
kvankam la francan majstron mi ne vidis.
Mi legis liajn versojn kaj eseojn,
admiris liajn lertojn kaj ideojn.
Mi volis, revis iam havi ŝancon
ekvidi, kore danki l' majstran francan.*

*En Varna U. K., ĉe la Nigra Maro,
mi varmis kun la vasta kolegaro;
nuliĝis inter ni la spac-distanco,
ke oni eĉ min fotis kun la franco.
Ja multe danki l' majstron mi esperis,
sed tiumomente l' vortoj malaperis —*



Prof. Gaston Waringhien (la dua de dekstre) kaj la aŭtoro Li Shijun (la tria de maldekstre) en Varna, 1978

*rimarkis mi la estimatan Gaston
komenci jam la maljunigan haston.
Mi volis diri al li: "Longan vivon!"
sed ne kuraĝis trompi l' efektivon.*

*Sed poste vidis mi kun ĝoj' en koro,
ke plue floras lia plum-laboro:
naskiĝis lia bela E-versio
de l' famaj "Robaioj" de Persio...
"Pli longan labor-vivon li trapasu!"
mi pensis, "Kaj pli multon li postlasu!..."*

*Naŭdekjariĝon lian multaj festis,
kiam subite l' Morto lin arestis.
Ĉu eviteblas tia homa sorto?...
Al ni ne mankas amo sed savforto!
La karan Gaston ni jam ne plu vidos,
sed kiel majstro longe li nin gvidos.*

KEES RUIG (Nederlando):

Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?*

LINGVO ne estas celo (nur kiam oni studas ĝin literaturcele), sed ilo, komunikilo.

Edukado-instruado komplikiĝas: oni devas studi tro multe da fakoj, sed mankas tempo.

Eŭropanoj ofte ne tiom perceptas tion, ĉar studo de alia eŭropa lingvo ne estas tiom malfacila por talentulo, sed por ĉinoj kun sia tute diferencstruktura lingvo tio estas grandega problemo. Estas severa handikapo kaj tiel rezultas en diskriminado: en la komunikado, en la negocado. Tio estas neakceptebla situacio.

Zamenhof semis, la Esperanto-movado flegis, verdigis la planton. Nun venas la horo de la vero: la tempo por rikolti. Ĉu la planto portas fruktojn?

Multaj ĉinoj, sed ne nur ili, lernis la Internacian Lingvon por praktikaj celoj. Kaj nun ili sin prezentas: "Ni volas rikolti." "Ni volas apliki Esperanton en ekonomio, komerco, aplikata scienco, tekniko."

Kaj nun montriĝas, ke Eŭropo, la lulilo de Esperanto, la sidejo de UEA, ne estas tiom progresinta. Ni ne estas pretaj! Ni ne bone faris nian taskon.

Kiel sonas unu mano aplaŭdanta?

La lingvo ne kulpas. Vi en Ĉinio faris la ĝustan

elekton. Sed ne faru nian eraron; ne estu tro moderaj. Esperanto travivis jarcenton sukcese; ĝi pruvis sian utilon.

Postulu de viaj partneroj la aplikon de la Internacia Lingvo.

Se ili ne volas kunlabori, donu al ili elekteblon: vi lernu aŭ Esperanton, aŭ la ĉinan. Donu pli favorajn negockondiĉojn al komercpartnero, kiu pretas negoci ĉu en Esperanto ĉu en la ĉina.

Postulu de UEA ke ĝi sekvu vian filozofion.

IKEF jam penas sed bezonas helpon.

Ĉina Aktiveco en Oostende montras ke vi pravas. Vi elektis la ĝustan lokon por via prezentado: Benelukso estas la 4-a ekonomia potenco en la mondo, post Usono, Germanio kaj Japanio, kaj en Belgio naskiĝis kaj loĝas la E.K., ido de Benelukso.

Ĝi estas la ĝusta loko por montri ke ekonomia komunumo, celante internacian komercan kunlaboron, signifas ankaŭ aplikon de komuna lingvo, ne nur ene de la EK, sed speciale ekstere, precipe al nia partnero de la estonto: Ĉinio!

* La artikolo estas parolado de la aŭtoro en la Esperanto-simpozio kadre de la ekspozicio de ĉinaj industriaĵoj okazigita en Oostende, Belgio, oktobre de 1991.

(Daŭrigo de p. 15)

de la periodo de Militantaj Regnoj la epigrafo ĝenerale estis mallonga. Tie estis ankaŭ multaj valoregaj bronzaĵoj, ekzemple ore damaskenita arĝenta tigro, manĝanta cervon. La tigro kun larĝe malfermitaj okuloj kaj streĉitaj oreloj tenas cervon en la buŝo. Ĝi forte etendas la malantaŭajn piedojn kaj duonlevis sin sur la antaŭaj piedoj.

Arkeologoj elterigis multajn bronzaĵojn de Handinastio (206 a.K. — 220 p.K.). En 1968 oni prifosis la tombon de Liu Sheng kaj lia edzino en Manchengurbo, Hebei-provinco. Liu Sheng estis princo Jing de Zhongshan-princlando de la Okcidenta Handinastio. La damaskenita incensujo kaj orumita lanterno de Changxin-palaco estas plej delikataj el tiuj ĉi elterigitaj objektoj. Sur multaj bronzaĵoj vidiĝas

la vortoj "de domo de princo de Zhongshan". Tio konfirmas, ke ili estis uzataj en la princa palaco.

Dank' al alta takso pri la historiaj objektoj en la lastaj jardekoj, oni trovis pli kaj pli ofte delikatajn bronzaĵojn el la fandotaj metalaĵoj. El ili la plej valora estas *guy*, ronda manĝujo plena de elstaraj punktoj, kun du ansoj. Ĝi estis notita en antikva libro, tamen perdiĝis por longa tempo. Arkeologoj trovis ĝin el forĵetitaj kupraĵoj kaj restituis ĝin, tial oni povas vidi tiun ĉi raran historian objekton.

Bronzaĵojn de nacimalplimulto oni trovis preskaŭ en ĉiuj lokoj de Ĉinio. En Kezuo, Liaoning-provinco, oni elterigis bronzan kruĉon. En Interna Mongolio kaj Ningxia oni trovis medalajn ornamaĵojn uzitajn de hunoj. En la provincoj Yunnan kaj Guizhou oni trovis bronzaĵojn konkujon kaj tamburon. Ĉiuj ĉi brilaj objektoj riĉigis la bronzaĵan trezorejon de Ĉinio. ■

Luzhi — akvolando sude de Yangzi

Teksto kaj fotoj de LING YOUJUAN

EN printempo mi venis al Luzhi, riverorika loko sude de Yangzi-rivero.

Oni diras, ke la pejzaĝo sude de Yangzi estas tre ĉarma. Multaj poetoj kaj literatoroj antikvaj kaj nuntempaj prikantis ĝin per siaj verkoj. Mi pensis, ke mi nepre rigardos propraokule la sopiratan pejzaĝon, se mi ne serĉos la medion priskribitan en iliaj verkoj. Tamen, tuj post la elaŭtobusiĝo mi trovis, ke mi falis inter modernajn domojn. “Ĉu ne estas la loko?” Ĝi ne estas antikva urbeto, kiun mi volas viziti! Efektive ĝi estas nova kvartalo de la urbeto Luzhi, kiu aperis en la lastaj jaroj. Tion diris al mi ĉiĉerono Juna Zhang.

Akompanate de Zhang, mi eliris el inter la domoj, trairis tri pontojn kaj atingis la lokon deziratan.

La subiranta suno ruĝigis la ĉielon kaj super glimbrilanta rivereto kuŝis ŝtona arkponto. Ambaŭflanke de la rivero estas vicoj da loĝdomoj kun blankaj muroj kaj nigraj tegoloj. La ponto nomata Hefeng konstruiĝis antaŭ ĉ. mil jaroj kaj estas konata kiel la plej malnova ponto en Luzhi. La ponto surhavas delikatajn reliefojn.

Laŭ vojo kun ŝtona pavimo ni eniris en mallarĝan strateton apud rivero. Zhang konigis al mi, ke la urbeto situas en Wuxian-gubernio, 25 kilometrojn sudoriente de Suzhou, Jiangsu-provinco. Ĉirkaŭ la urbeto dislokiĝas lagoj kaj en ĝi retas riveretoj. Sekve, ĝi famas per abundo da riveretoj, pontoj kaj stratetoj kaj estas honorita per la nomo lando de pontoj. Iam tie estis 72 pontoj, kaj nun 41. La pontoj estas diversgrandaj kaj malsamstilaj, interalie, plurspanaj, unuspanaj, arkaj, platplankaj kaj ĝemelaj. Kaj krome, vidiĝas ankaŭ ponto malpli ol unu metron longa. La antikva granita ponto Zhengyang en la orienta parto de la urbeto estas la plej longa en ĝi. Ĝi, kun longo de 52 m. kaj solida korpo el granito, aspektas majesta; dum la Orienta kaj Okcidenta Chuihong-pontoj ambaŭflanke de kiosko estas delikataj kaj graciaj. La pontoj faciligas la trafikadon en la urbeto kaj beligas la medion.


La urbeto havas pli ol 7 000 loĝantojn kaj ĉiuj


domoj sidas ĉe riveretoj kaj frontas al stratoj, kio oportunas al la vivo. En ĝi etendiĝas naŭ stratoj, ĉe kiuj funkcias butikoj. Tie ĝueblas diversaj manĝaĵoj.

La spaco inter domoj estas tre malvasta, ke la loĝantoj povas manpremi al najbaro tra fenestro. Preskaŭ post ĉiuj pordoj al stratoj estas vestibloj. Parto de la pordoj estas trairejoj al granda korto.

Laŭirante la duonluman kaj mallarĝan trairejon,

En kaj ekster domo





Muro de loĝdomo

mi vidis, ke ambaŭflanke de ĝi staras lignaj pordoj de kortoj. Ĉe la fino vidiĝas kortoj por unu aŭ pluraj familioj.

La kortoj kun multaj domoj plejparte estis konstruitaj de riĉuloj en la pasinteco. La muroj blankaj, la tegmentoj nigrategolaj kaj la firstoj elstaraj, distingiĝas per eksterordinara fajroizola muro sur tegmento. Ĝenerale, la tieaj loĝdomoj rigardas al la sudo, iom al sudokcidento. Plejparto de la pordoj kaj fenestroj estis faritaj el ligno. La pordo surhavas reliefon kaj la fenestro-kradoj aĵurajn reliefojn. La vestiblo estas meblita per kvadrata ligna tablo kaj apogseĝoj, malhele lakitaj kaj gravuritaj, kiuj impresas per antikveco kaj eleganteco. En la korto estas puto, lavtablo, florbazo kaj bambustangoj por sunumi vestojn. Nuntempe sur la antikvecaj domoj elstaras televidilaj antenoj, kiuj kvazaŭ atentigas, ke la urbeto troviĝas ja en la 90-aj jaroj.

Por apreci la nebulan matenon de la akvolando, je la kvina frumatene de la sekva tago mi denove suriris la ŝtonan vojon de la urbeto. Tiam ne aŭdiĝis kokerikado nek bojado, tamem loĝantoj jam komencis novan tagon: oni aĉetas legomojn, hejtas fornon, malfermas butikojn, lavas ĉe rivero... Jen paca mateno en suda Ĉinio, kiun mi imagis.

Forte interesis min tetrinkejo de la urbeto. Ĉiuj sidlokoj estis okupataj. La klientoj estis ekskluzive maljunuloj. En malhela lumo ili senzorge babilis

trinkante teon. "Bonan matenon! Vi venis antaŭ ol matenmanĝi?" mi salutis ilin. La maljunuloj mire rigardis min, sed iom poste, ili interparolis kun mi en dialekto ne bone komprenata de mi. Ilia respondo surprizis min: en la urbeto estas la kutimo trinki teon frumatene kaj sekve la tieaj tetrinkejoj eklaboras je la tria nokte. Ĉiutage maljunuloj frue venas al tetrinkejoj. Ili restas tie unu-du horojn, sin plezurigante per tetrinkado. Forta teo en mateno estas tre utila por la gorĝo kaj okuloj. En la urbeto kolportistoj vendas diversajn frandaĵojn, kiel ekzemple, faboj, arakidoj, konfitaĵoj k.s. En tetrinkejoj oni vendas ankaŭ huntunojn kaj aliajn farunaĵojn. Mi informiĝis de ili, ke estas ĝentilaĵoj por tetrinkado. Ekzemple, kiam iu prezentas teon, la akceptanto devas kelkfoje frapeti sur la tablo per du fingroj, por esprimi dankon kiel signon de adorkliniĝo. Oni verŝas teon nur je du trionoj de la taso; troa plenigo estas ne ĝentila. En la urbeto funkcias 4-5 tetrinkejoj. Oni tetrinkas ĉiam sur la sama sidloko. La sidlokoj ne estas rezervitaj, la kutimo formiĝis post frekventado.

Ĉiumatene, sub la granda ponto ĉe la limo inter la kvartaloj nova kaj malnova amasiĝas ŝipetoj. Tie oni faras negocon pri freŝaj akvoproduktadoj. Sub la ponto de tempo al tempo traveturas ŝipetoj julataj de virinoj el fiŝistaj familioj. Iliaj triangula kufo kaj jupo el ŝtofpecoj certigas al vi, ke vi estas ĝuste en la akvolando sude de Yangzi-rivero. ■




Loĝdomoj ĉe rivero

Ŝtona ponto



Ĉerpi akvon






En korto



Poto kun kirla desegno



Poto kun reta desegno

HISTORIA MISTERO

Kion signifas geometriaj figuroj sur koloraj fajencaĵoj?

de SHI PING

LA skulpturo de Ĉinio naskiĝis en neolitiko antaŭ 7 000 jaroj. Kiel unu el la ĉefaj karakterizaĵoj de neolitiko la apero de fajencaĵoj ne nur pliigis la ĉiutagajn bezonaĵojn de la homoj, sed ankaŭ akcelis la progreson de teknologio, tial ĝi havas gravan valoron por la homa vivo.

En la lasta periodo de neolitiko ne nur estis metio de farado de koloraj kaj nigraj fajencaĵoj en la baseno de la Flava Rivero, sed ankaŭ aperis fajencaĵoj kun geometriaj figuroj. Tiaj fajencaĵoj famiĝis pro tio, ke ili portas enpremitajn geometriajn figurojn kiel ornamon. Ili distribuiĝis en la orien-

taj kaj sudorientaj provincoj de Ĉinio, kiel Jiangsu, Jiangxi, Zhejiang, Fujian kaj Guangdong, precipe en la marbordaj regionoj. Ili ekzistis ĝis Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.).

La fajencaĵoj kun geometriaj figuroj dividiĝas en du specojn: molajn kaj malmolajn. La molaj estis faritaj el argilo tenaca aŭ argilo kun subtila sablo post bakado per milda fajro. La malmolaj estis bakataj per akra fajro. Antaŭ la bakado oni donis brunetan aŭ grizetan koloron al la korpo de la molaj fajencaĵoj kaj grizan koloron al tiu de la malmolaj. El fajenco oni faris poton, vazon, vinujon, bovlon, teleron, tason k.a., per mano, mo-


delilo aŭ rado. Kiam la korpo de la bakota fajencaĵo estis ankoraŭ malseka, oni per modelilo enpremis geometriajn figurojn en ĝian difinitan lokon kaj poste bakis ĝin.

Neolitiko estis periodo, en kiu la desegnoj sur la fajencaĵoj iom post iom transiris de vivecaj bestaj bildoj al abstraktaj geometriaj figuroj. Sur la fajencaĵoj videblis ĉefe belaj linioj rektaj, kurvaj, ondaj, nubaj, fulmaj, spiralaj kaj cirklaĵoj. La signifo, kaŭzo kaj origino de tiuj geometriaj figuroj restas enigmo de la ĉina arto. Pri tio ĉinaj arkeologoj kaj belartistoj longe diskutis.

Iuj opinias, ke la geometriaj figuroj sur fajencaĵoj montras, ke la



Poto kun zigzaga desegno



Poto kun labirinta desegno

koncepto de la primitivuloj transiras de praktika uzo al estetiko. La geometriaj figuroj devenis de la teknologio de fajencaĵoj. En la komenca periodo oni faris fajencaĵon per mano, kaj en farado de fajencaĵoj per volvo de argilaj strioj oni devis bati ĝin korpon por kompaktigi ĝin kaj igi ĝin malfacile difektebla. La ŝnuroj ligitaj al la batilo lasis sur la supraĵo de fajencaĵoj siajn signojn, kiuj estis ĝermo de la geometriaj figuroj sur la fajencaĵoj. En la frua tempo tiaj figuroj intime rilatis al la homa vivo, ekz. la figuroj de kvadrato, reto kaj mato ofte videblaj en suda Ĉinio havas rilaton al plektaĵoj el bambuo, fragmito, liano kaj kanaĵo kreskantaj en la suda parto de Ĉinio. Kun disvolviĝo de la socia ekonomio oni postulis, krom praktika uzo, ankaŭ la belan aspekton de la fajencaĵoj. Sekve la geometriaj figuroj fariĝis iom post iom regulaj kaj prezentantaj bildojn, kaj la ornama bezono fariĝis iom post iom tre grava. La abstraktaj geometriaj figuroj fakte montras, ke la koncepto de la primitivuloj pri estetiko apartiĝis de praktika uzo.

Aliaj diras, ke kvankam la geometriaj figuroj sur fajencaĵoj devenis de la homa vivo, tamen multaj el ili rilatis al tria totemo. Multaj geometriaj figuroj en suda Ĉinio havis rilaton al la totemo serpento de la antikva ĵue-nacio, ekz. spirala linio similas serpenton

kurbiĝintan kaj onda linio tiun rampantan. En la antikva socio la desegnoj sur la fajencaĵoj ne estis ornamaĵo, sed emblemo de certa homa grupo kaj manifestiĝo de la materia vivo de la klana komunumo, kaj ili ekzistis plej ofte en formo de totemo aŭ aliaj adoraĵoj de la klano. La ĉefaj geometriaj figuroj en neolitiko devenis eble de desegnoj de bestoj: La rektaj linioj sur koloraj fajencaĵoj de Banpo-tipo en la baseno de Weihe-rivero en norda Ĉinio transformiĝis el desegno de fiŝo kaj la helicaĵoj linioj sur la koloraj fajencaĵoj de Miaodigou-tipo kun Guanzhong-regiono de Shaanxi-provinco kiel la centro transformiĝis el desegno de birdo. Se la geometriaj figuroj sur la koloraj fajencaĵoj vere estas triaj totemoj, la supre diritaj rektaj kaj helicaĵoj linioj en tiuj lokoj en neolitiko reprezentas malsamajn tribojn kun figuroj de fiŝo kaj birdo kiel totemoj. La tiamaj desegnoj sur la koloraj fajencaĵoj transformiĝis iom post iom el diversaj vivoveraj figuroj de bestoj en regulajn abstraktajn geometriajn figurojn. Tiuj desegnoj ŝajne estis nur bela ornamo kaj eble havis gravan signifon de triaj totemoj.

Tria asertas, ke ĉar la geometriaj figuroj sur la koloraj fajencaĵoj devenis de la produkta laboro kaj ordinara vivo, ili bone spegulas diversajn flankojn de la tiam socia vivo (ekz. naturo, produkta laboro kaj totemo). La neolitikaj ko-

loraj fajencaĵoj, elterigitaj en Gansu en nordokcidenta Ĉinio, kies aperturoj havas formon de homa kapo kun vizaĝo surhavanta desegnojn de feloj de linko, tigo, leopardo k.a. kaj kies korpoj portas desegnojn de birdoj, montras, ke la tiamaj triboj havis la kutimon tatui siajn vizaĝojn kaj korpon. La komuna tatuado povis plifortigi la ligojn inter la membroj kaj timigi aliajn tribojn kaj rabobestojn. En la primitiva socio kun malgranda produkta forto la homoj povis vivi en la malbona medio dank' al solidareco de la triboj, tial ili ne metis belan ornamon sur la unuan lokon. Kaj plie, la geometriaj figuroj havas vastan sencon. Unu geometria figuro povas reprezenti plurajn estaĵojn kaj havi plurajn signifojn. La neolitikaj fajencaĵoj, kies geometriaj figuroj devenis de la vivo kaj limiĝis je la aktuala vivo, portas geometriajn figurojn ĉefe en sia meza parto kaj nenion figuron en la loko pli malsupra. Ĉar la tiamaj homoj agadis ĉiam sur la planko kaj la diversaj ĉiutage uzataj fajencaĵoj estis metitaj kompreneble sur la plankon, tial la geometriaj figuroj devis esti faritaj sur la fajencaĵo en la parto plej facile vidata de homoj kaŭrantaj aŭ sidantaj.

La signifo de la geometriaj figuroj sur la neolitikaj fajencaĵoj nun ankoraŭ interesas la ĉinajn arkeologojn kaj belartistojn. ■

AMUZOJ

Persekuto (Humuraĵo)



1



2



3



4

1. Estis viro tre lerta en kurado. Iutage ŝtelo okazis en lia hejmo. Lia familiano urĝis lin persekuti la ŝteliston, rimarkinte ke ĉi tiu ĵus forlasis la domon.

2. La viro ekkuregis en la direkto de la ŝtelisto kaj baldaŭ vidis lin. Kurante, li kriis: "Haltu! Certe mi atingos vin." Trovinte sin persekutata, la ŝtelisto kuris pli rapide.

3. Tio incitis la viron. Li laŭte demandis: "Aĉulo, ĉu vi kuraĝus konkuri kun mi?" Dirinte li plirapidigis la kuradon kaj baldaŭ antaŭiĝis al la ŝtelisto. Li ridis: "Rigardu! Kiu el ni pli lertas en kurado?"

4. La viro daŭre kuregis kaj renkontis sian amikon. Ĉi tiu demandis lin, pro kio li kuregas. La viro haltis: "Mi persekutas ŝteliston. Vidu, je kia granda distanco mi antaŭiĝis al li, ke eĉ lian ombbron ni ne vidas."

Solvo por krucvort-enigma de la 7-a numero

1	a	2	s	3	t	4	r	5	o	6	n	7	o	8	m	9	o	10	p	11	a	12	s	13	t	14	i	15	ĉ	16	o
17	s	t	r	a	t	e	g	i	e	18	r	e	m	i	s	i	o														
19	t	r	a	m	o			20	i	t	r	i	o		22	u	n	u			m										
23	r	a	t	o		24	k	v		25	o	l		26	a	t	o		27	ĉ	i										
28	o	b	o		29	s	t	o	30	p		31	o	32	a	z	o		33	p	e	c									
34	L	i		35	A	F	P		36	e	37	k		38	d	o		39	g	a	l	e									
	o		40	a	m	e		41	z	l	o	42	t	o		43	p	a	s	a	t										
44	g	45	a	l	e	r	i	o	47	m	o	r	48	t	a	m	a	r	o												
49	o	r	i	n	o	k	o	50	a	t	i	n	g	a	ĵ	o	j														

En la naskiĝloko de Congkapa

Teksto de WANG XIAN

Fotoj de ZHENG YUNFENG

LA antikva civilizacio de la basenoj de la Flava Rivero kaj Huangshui-rivero elspiras religian kulturan arton. Kiom da budhistoj inspiris kaj kiom da turistoj ĉinaj kaj alilandaj altiris al si Tar-templo en la naskiĝloko de Congkapa, fondinto de la flava sekto de lamaismo!

Tar-templo de la flava sekto de lamaismo, je 25 kilometroj for de la urbo Xining, situas en Lushar de Huangzhong-gubernio kun belaj pejzaĝoj.

PIA PILGRIMADO

Por esprimi sian plej altan respekton kaj admiron, ĉinoj kutime uzas la idiomajon: "adore ĵeti sin sur la teron". Sed kiom da homoj vidis la sinĵeton sur la teron? Mi vidis tion propraokule. Veturante

sur la vojo al Tar-templo, tra la aŭtofenestro mi de tempo al tempo vidis tibetajn ĉirkaŭ-40-jarajn virojn kaj virinojn. En simplaj blankaj peltaĵoj kaj kun la manoj dike volvitaj per blankaj ŝtofoj, ili preskaŭ rampis antaŭen sur ambaŭ flankoj de la vojo. Ili staris, kunpremis la manojn super la kapo kaj direktis la okulojn antaŭen. Iom poste ili subite etendis la manojn antaŭen kaj sin ĵetis sur la teron. Poste ili restariĝis, antaŭen iris dekelkajn paŝojn, haltis kaj ripetis la movojn. Tiel pie ripetante dekmil-foje kaj eĉ centmil-foje, ili finfine atingis Tar-templon, la sanktan lokon en ilia koro.

Ah! Estas vere malfacile fari tian longedaŭran adoradon, se oni ne estas sufiĉe forta kaj firmavola.


Kompreneble, plej grava estas la spirito de senlima respekto kaj admiro esprimita de ilia vizaĝo. "Ĉu ni povus elaŭtiĝi por pririgardi?" La ŝoforo respondis: "Ne. Se nia aŭto haltos, ili opinios, ke ni volas almozdoni, sed fakte ni kunportas nenion." Ja vere, ni nenion kunportis, ankaŭ la pilgrimantoj ne havis kun si pakaĵon. Eble ili venis de malproksime almozpetante kaj tranoktante subĉiele. Laŭ la sekularaj vidpunktoj, tio estas ago normala kaj respektinda, tial oni devas doni al ili helpon.

Por trovi taŭgan lokon por foti, ni aŭte rondveturis ĉirkaŭ Tar-templo. Tiu longforma templo okupas areon de 40 hektaroj kaj sin apogas al monto. Ĝiaj pli ol 30 domoj formis grandiozan konstruaĵaron en la verda montvalo.

En la templo regis mistera religia atmosfero. Senĉese turniĝadis la sutro-tubo kun sutroj ene kaj 6 esencaj budhismaj vortoj ekstere. Antaŭ la budha statuo profunde riverencis pilgrimantoj. Longatempe kapfrapate, la dika malmolligna planko surhavis profundajn kavojn.

Tar-templo ekkonstruiĝis en 1560. Ĝiaj ĉefaj konstruaĵoj konsistas el la imponaj konstruaĵoj memore al Congkapa — la Granda Tegment-orumita Templo, la eleganta Malgranda Tegment-orumita Templo, la Granda Sutra Halo, kiu okupas areon de 1981 kvadrataj metroj kaj povas enteni

Skemo de la antikva vojo Tangbo



2 000 lamaojn, Ruyi-pagodo memore al Ŝakjamunio kaj granda kuirejo. En la kuirejo kuŝas granda kupra kaldrono kun diametro de pli ol 3 metroj. Ĝi povas kuiri por unu fojo dekkelkajn bovojn. De tio oni povas imagi al si, kiom multis siatempe lamaoj en la templo, kiel prosperis la budhisma aktivado. Laŭ la historia kroniko, orumado de la tagmentoj de la Granda kaj Malgranda Tegmentoromitaj Temploj forkonsumis 1 000 taelojn da oro kaj 10 000 taelojn da arĝento. Antaŭ la templo baniĝanta de la sunlumo ankaŭ ni estis ore prilumitaj, kaj ni subite eksentis, ke ankaŭ ni ekbrilis! La konstruaĵoj de Tar-templo estas diversstilaj. Iuj okulfrapas per tibetstilaj ebenaj tegmentoj kun ŝtuparformaj fenestroframoj kaj ĉirkaŭmuroj, aliaj karakteriziĝas per han-stilaj pintaj tegmentoj kun tri randoj; triaj montras la tibetan kaj hanan stilojn; kvaraj portas arkitekturajn trajtojn de hinda kaj nepala stiloj. Ili impresas varie kaj originale!

Trairinte Tar-templon ni rimarkis, ke preskaŭ ĉiuj muroj de ĝiaj haloj estas pentritaj. Tiuj freskoj ĝenerale estas ruĝaj, flavaj kaj bluaj en bela harmonio de koloroj

varmaj kaj malvarmaj, kiuj montriĝas brilaj kaj dekoracie belaj. Fresko, blokadbrodaĵo kaj buterfloro famas kiel tri eksterordinaraj artaĵoj de Tar-templo. La skulptitaj budhaj statuoj de Tar-templo estas versimilaj, la brikaj homfiguroj, floroj kaj aliaj gravuraĵoj estas bele faritaj. Dank' al tiuj majstraĵoj, la templo ĝuas renomon de arta perfekteco kaj estas adorata sanktejo de religia arto.

Malgraŭ la maloportuna trafiko pro la situo sur altebenaĵo, ĉiujare Tar-templo estas pilgrimata kaj vizitata de centmiloj da homoj. Mi ja estis unu el ili. Veturante sur la antikva vojo al Tibeto, mi havis alian animstaton: serĉi ion pli antikvan, kaj eĉ pli valoran ol Tar-templo.

CONGKAPA KAJ TAR-TEMPLO

La Memorturo de Congkapa estas pli frue konstruita ol la Tar-templo mem. En la Granda Tegment-orumita Templo staras 25.5-metre alta turo arĝente tegita kaj volvita per kelkdek tavoloj da blankaj rubandoj. En la supra parto de la turo sidas statuo de Congkapa, kaj sub la turo konserviĝas la postnaskaĵo de Congkapa. Congkapa naskiĝis tie en 1357. En

la aĝo de 7 jaroj li monaĥiĝis kaj 10 jarojn poste iris al Tibeto por plua lernado. Li majstriĝis en Tibeto. En 1419 li forpasis en Gandan-templo de Lhaso. La supre diritan turon oni konstruis 141 jarojn post lia forpaso. Laŭdire, en la loko, kie oni enterigis lian postnaskaĵon, elkreskis alta ombroriĉa blanka santalo kun 100 000 folioj. Sur ĉiu folio vidiĝis leon-forma budha bildo. Por memori Congkapa, liaj disĉiploj konstruis la grandan arĝentan turon en la tereno kun la blanka santalo kiel la centro.

En la triaetaĝa halo pendas portreto de Congkapa. Laŭdire, Congkapa pentris sin per nazsango kaj sendis ĝin de Tibeto al sia patrino, kiu tagnokte sopiris lin. Pro la fumado de buter-lampoj dum longa tempo la portreto jam fariĝis nere-konebla, tamen ĝi konserviĝas kiel valora kultura objekto.


Congkapa famiĝis pro la religia reformado.

Kiam princino Wencheng de Tang-dinastio kaj nepala princino Chizun edziniĝis al Sunzamkampo de Tubo, ili ĉiuj kunportis statuon de Ŝakjamunio kaj grandan kvanton da sutroj. Dank' al ilia iniciato kaj aprobo de Sunzamkampo, budhismo oficiale enkondukiĝis en Tubon. Kiam Congkapa majstriĝis en Tibeto, lamaismo sin trovis en ĥaosa stato. Pro multnombraj sektoj, malseveraj religiaj disciplinoj kaj diboĉado de bonzoj, ĝi perdis subtenon de la popolo. Sub tiaj cirkonstancoj Congkapa iniciatis religian reformadon kun severa observo de religiaj disciplinoj kaj plifortigo de templaj organizaĵoj kaj regularo kiel la ĉefa enhavo kaj akiris sukceson. Pro tio li estis rekonita kiel gvidanto de la tibetaj lamaoj. La de li fondita sekto Gelu de lamaismo estis nomata flava lamaismo pro tio, ke la sektanoj portas la flavan ĉapon signifantan severajn religiajn disciplinojn, kaj poste fariĝis sekto, kiu okupas dominan pozicion en lamaismo.

La tibeta budhismo estas ne

En Tar-templo





Lignaj skulptaĵoj sur la templa konstruaĵo


tute sama kiel budhismo en Tubo, sed ili estis de la sama origino. Laŭdire, Congkapa foje oferis buter-floron antaŭ la statuo de Ŝakjamunio kunportita de princino Wencheng en Tubon, tial buter-floro herediĝas ĝis nun kiel religia arto de Tar-templo kaj renomiĝis tra la tuta mondo. Por eviti la fandiĝon de butero, oni faras buter-florojn en frosta vintro. Tiam budhismaj artistoj elektis unuaklasan puran buteron, enmiksitis en ĝin diversajn naturajn mineralajn koloraĵojn, mane tiris la buteron, trempante la manon en akvon kaj modlis iom post iom diversajn florojn kaj homfigurojn sur pretigitaj faskoj de pajloj. La enhavo temas ĉefe pri popularaj rakontoj. Mi propraokule vidis buteran modlaĵon "Entibetiĝo de princino Wencheng". Ĝi longis proksimume 20 metrojn kaj altis pli ol 3 metrojn kaj plene okupas unu eksponan halon. Ĝi bildigas

serion da grandiozaj scenoj kun legendaj detaloj de la tuta vojaĝo de princino Wencheng de Chang'an de Tang-imperio al Tubo. Sur ĝi vidiĝas pli ol 200 homfiguroj, centoj da belaj kaj fortaj ĉevaloj, kioskoj kaj pavilonoj, floroj, birdoj kaj raraj bestoj. Okaze de la Lanterna Festo de la 8-a ĝis la 15-a de la unua monato laŭ la luna kalendaro, Tar-templo okazigas solenan religian kunvenon, kaj la buteraj modlaĵoj estas montritaj sur altaĵoj de la placo. "Entibetiĝo de princino Wencheng" estas unu el la tradiciaj buteraj modlaĵoj. Kiel longa historia rivero, la nomita modlaĵo vekas karmemoron al prauloj kaj rememoron pri la amikeco inter la tibeta kaj hana nacioj.

En Tar-templo mi vere trovis pli antikvan kaj pli valoran objekton. ■

La statuo de Congkapa en Tar-templo Foto de ZHANG WENDA







Tar-templo

Ligna skulptaĵo interne de halo






Brikaj gravuraĵoj sur la muro de la templo



Kupra sutra kolono

Ornamo en la sutra halo



79B-10056



Surroka bildo de EUGENO DAVKAEV (Eksa Sovetunio)

Hispana palaco de la 17-a jarcento de JULIO ARGÜELLES GARCIA (Hispanio)

